

1^a Jaro. — N^o 2^a

Augusto 1905

ESPERO PACIFISTA

MONATA ORGANO DE

« PACIFISTO »

(INTERNACIA SOCIETO ESPERANTISTA POR LA PACO)



« Sub la sankta signo de l'espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj. »

ZAMENHOF

Unu numero : 50 centimoj.

Vidu aliajn sciigojn sur la dua paĝo de l'kovrilo.

ENHAVO

Gabriel Chavet. — La internaciaj monpruntadoj dum milito.

La Societo

Avizoj de l' provizora Komitato. — Ĝenerala kunveno en Lucerno. — Libraro pacifisma. — Niaj societanoj en Boulogne-sur-Mer. — Novaj aliĝoj — Mono ricevita.

Miksaĵoj

- I. **Militfaktoj kaj armadoj.** — Ekstrem-orienta milito. Paco? — Kosto de la batalo apud Cu-Ŝima.
- II. **Politiko internacia.** — Ĝenerala stato. — Francujo kaj Germanujo. — Francujo kaj Granda Britanujo. — Norvegujo sendependa; ĝiaj arbitraciaj traktaĵoj. — Rumanujo kaj Turkujo. — Kreto.
- III. **Arbitracio internacia.** — Haga Kortumo: Nova membro. — Haga Kortumo: La franca-britana proceso.
- IV. **Movado pacifisma.** — Berna Oficejo: Premio Narcisse Thibaut. — 14-a universala Kongreso en Lucerno. — Decidaĵoj de la 5-a franca Kongreso (Lille). — Decidaĵoj de la 2-a angla Kongreso (Bristol). — Novaĵoj de la Societoj.
- V. **Internaciismo.** — Berna Konferenco por la protektado de la laboristoj. — Internacia Instituto terkultura.
- VI. **Movado Esperantista.** — Unua Kongreso Esperantista en Boulogne-sur-Mer. — Esperanto ĉe la Societoj por la Paco. — Esperanto kaj pacifismo ĉe la Delegitaro por akcepto de helpa lingvo internacia.
- VII. **Libroj kaj revuoj.** — Studoj pri la ekstera politiko de la regnoj (de E. HALÉVY, H. HAUSER, G. GAULIS, A. MÉTIN, F. DELAISI kaj Ch. GUIEYSSE). — La germana monda politiko kaj la Mahometanaro (de A. ULAR).

Vortaro pacifisma, de Gaston Moch.

Korespondado.

Oni sendu provizore ĉiujn komunikaĵojn al S-ro **Gaston Moch, 16, avenue de la Grande-Armée, Paris 17^e.**

Jara abono, sen aliĝo al la Societo Esperantista por la Paco, 4 frankoj. — *Kun aliĝo kaj ricevo de la aldonoj, almenaŭ 5 frankoj (vidu regularon).*

Noto. — La unua periodo (julio-decembro 1905) estas konsiderata kiel tuta jaro, kaj kostas do plenan jarpagon.

Oni pagu per ĉeko, poŝta mandato, karta mandato aŭ banka bileto (valoro laŭ franca mono. *Poŝtaj markoj ne estas akceptataj.*

Manuskriptojn ni ne resendas.

Represo de niaj artikoloj estas permesata, eĉ petata. Oni nur bonvolu citi la revuon, kaj, se l'artikolo estas subskribita, la nomon de l'aŭtoro.

Vidu aliajn sciigojn sur la 3-a paĝo de l'kovrilo.

Espero Pacifista

MONATA ORGANO DE LA SOCIETO ESPERANTISTA POR LA PACO

INTERNACIAJ MONPRUNTADOJ DUM MILITO

I

En la unua numero de *Espero Pacifista*, mi skribis kelkajn vortojn pri la problemo de la monpruntado dum milito. Mi diris ke de jam longe la pacifistoj volonte opinias ke la fakto kiu konsistas helpi militantan nacion, pruntante al ĝi monon, estas malrespekto de la neŭtraleco. Mi notis kelkajn pacifistajn opiniojn pri tio, de la decidaĵoj de la kongresoj pacaj de Berno (1892) kaj Anvers (1894) ĝis la propono de S-ro Casevitz, farita al unu el la lastaj kunvenoj de la *Konstanta Delegacio de la francaj pacaj Societoj*. Mi intencas hodiaŭ studadi pli longe tiun problemon kiu havas, precipe en niaj nunaj tempoj, grandan gravecon, kaj kiu povas naski iam multajn konfliktojn.

Hodiaŭ, tre malmulte da regnoj (eble nur la Unuigitaj Ŝtatoj, Anglujo kaj Francujo) povas fari militon, ne pruntepetante monon de aliaj regnoj. Ĵus mi legis, en *Pages Libres* (n-ro 236) artikolon de S-ro Delaisi, pri supozata milito inter Anglujo kaj Germanujo. Laŭ S-ro Delaisi, Anglujo povas militadi per siaj propraj kapitaloj ; sed Germanujo tute ne povus. La grandaj germanaj bankoj ne havas plu oron, de la granda financa krizo de 1901 ; la kapitaloj estas malmultaj. S-ro Delaisi montras ke nur Francujo povas prunti monon al Germanujo, kaj tio estas, laŭ li, la kaŭzo de la signoj de simpatio, donataj de la germana imperiestro al franca nacio, kaj de la germana deziro alproksimigi ambaŭ popolojn.

Tiel opinias S-ro Delaisi, kiu kutimas ĉiam serĉadi la monajn, ekonomiajn kaŭzojn de la faktoj de internacia politiko. Cetere, tielfarante, li ne estas malprava. Antaŭ niaj nunaj tempoj, militoj estis kaŭzitaj de dinastiaj malkonsentoj, aŭ de ambicioj princaj, aŭ de aferoj pri honoro, aŭ de malgravaj faktoj. Hodiaŭ oni povas senerare diri ke ĉiuj problemoj interna-

ciaj havas ekonomiajn fundamentojn. Konsekvence, la demando pri monpruntado dum milito, kiu povas kaŭzi gravajn konfliktojn (tion pravas la teorio de S-ro Delaisi) prezentas grandan intereson por pacifismo.

II

Ĉiu scias ke dum milito, regno neŭtrala devas alporti absolute nenian helpon al unu el la militantoj aŭ al ili ambaŭ. Inter la helpoj alportebaj, unu konsistas sendi al militanto necesajn objektojn por la daŭrigo de milito. Ĉiuj juristoj opinias ke regno neŭtrala devas sendi nek militajn municiojn, nek armilojn, nek nutraĵojn, nek monon. Sed ĉu tio, kio estas malpermesata al regnoj neŭtralaj, povas esti permesata al regnantoj de tiuj regnoj? Jes, diras la juristoj (kaj pli malsupre ni diskutos tiun teorion), sed, tre ofte, la malo fariĝas. Oni malpermesas al regnantoj de neŭtrala regno sendi difinatajn objektojn al la militantoj, kaj tiu malpermeso estas farita per du rimedoj:

1-e, la neŭtralaj regnoj povas malpermesi ke la difinataj komercaĵoj eliru el la regno; tiel dum la franca-germana milito, Svisujo kaj Belgujo malpermesis eksteren sendadon de armiloj;

2-e, ĉiu el la du militantoj difinas ian kolekton da komercaĵoj kiel kontrabandaĵo.

Sed la juristoj ne plu estas interkonsentaj kiam ili devas difini la objektojn kiuj estos konsiderataj kiel kontrabandaĵo. Ĉu oni devas tiel difini nur la armilojn kaj la militajn municiojn, aŭ ĉu oni devas difini ankoraŭ la nutraĵojn... kaj la monon? Je l'komenco de rusa-japana milito, Rusujo sciigis ke ĝi konsideros kiel kontrabandaĵo karbon, rizon, nutraĵon (deklaracio de 14/27-an de februaro 1904) kaj Japanujo sciigis ke ĝi tiel konsideras nutraĵojn, trinkaĵojn, karbon kaj monon (deklaracio de la 11-an de februaro 1904). Ni pli malsupre vidos ke praktike, tiuj deklaracioj havas tre malmulte da intereso, sed nun, ni nur demandos ĉu *jure* oni povas konsideri monon kiel kontrabandaĵo.

Se estas juste ke oni permesas al regnantoj de neŭtrala regno vendi municiojn militajn, armilojn kaj nutraĵojn al militanto, ĉu oni devas ankaŭ permesi ke ili sendu monon?

Vendi armilojn, municiojn, nutraĵojn estas nur komerca afero. La komercantoj kontraktas*indiferente kun ĉiu, kiu sin turnas al ili. Ilia komerco estas farata same indiferente dum paco kaj dum milito. Tio estas nur afero komerca. Pruntado de

mono estas aliaĵo. Oni pruntas monon al tiu kiu estas la plej inda je konfido, al tiu kiu estas la plej simpatinda, al tiu kies konduton oni aprobas. De la komenco de la nuna milito, Angloj pruntis monon al Japanoj, kaj Francoj al Rusoj. Do, vendi komercaĵojn estas fari *aferon*, prunti monon estas fari *servon*. Kaj pruntado de mono estas do tre grava malrespekto de neŭtraleco.

Tiu tezo ne estas tute ĝusta kaj oni povas al ĝi prezenti du kontraŭdirojn.

1-e, monpruntado estas ofte afero komerca kaj ne sentimental. Oni aĉetas akciojn de komercaj societoj kiujn oni tute ne konas, por kiuj oni havas nenian simpatian, nur por ricevi grandan profiton. Multaj personoj tute abomenas la agojn de la turka sultano kaj tamen pruntas sian monon al li, ĉar ili pensas ke tiu afero alportos al ili multe da profito.

2-e, aliflanke vendi municiojn kaj aliajn komercaĵojn povas esti ofte konsiderata kiel servo, helpo, ĉar la komercistoj, en tiuj okazoj, ne estas senpartiaj kaj vendas pli volonte aŭ kun pli bonaj kondiĉoj al la kliento kiun ili preferas.

Konsekvence, se oni permesas la transsendon de ĉiuj komercaĵoj al militantoj, oni devas permesi ankaŭ la transsendon de mono.

Sed, se oni malpermesas la transsendon de tiuj objektoj (municioj, armiloj, nutraĵoj kaj aliaj), ĉu oni devas ankaŭ malpermesi la transsendon de mono? Tio estas alia problemo.

III

Nenia regno, diras kelkaj juristoj, estas respondeca je la agoj de la regnantoj. Ĉiuj regnantoj estas liberaj agi laŭ sia volo. Ili konas la regulojn pri kontrabandaĵo, publikigitaj de ambaŭ militantoj. Ili do estas tute liberaj riski individue la aferon.

Sed oni tre bone povas respondi ke regno kaj regnantoj ne estas apartigeblaj. Regno estas regnanto. Kiam tre multaj regnantoj pruntas monon al alia regno, ili estas incitataj tre ofte de sia regnestro. La pruntado povas sukcesi nur, se la regnestro ĝin favorigas kaj faciligas.

Sed alian respondon oni povas fari. La samaj juristoj kiuj tre bone apartigas regnon kaj regnantojn, proklamas ke ĉiu regno neŭtrala povas tre bone malpermesi vendadon eksteren de siaj objektoj al la militantoj, pro iaj politikaj kaŭzoj. Ili tre bone konsentas ke neŭtrala regno punu la regnantojn kiuj malrespek-

tas tiun malpermeson ! Konsekvence ni povas konkludi ke regno havas perfekte rajton malpermesi la pruntepetadon de la militantoj, en sia lando ¹.

Sed ĉu tiuj malpermesoj povas esti efikaj ?

Ni pli supre diris ke tiu malpermeso povas esti farita de du rimedoj, 1-e, aŭ de la neŭtralaj regnoj, kiuj ne permesas ke siaj regnanoj sendu objekton al militantoj 2-e, aŭ de la militantoj, kiuj decidas ke tiuj objektoj estas milita kontrabandaĵo.

La reguloj pri kontrabandaĵo ne povas havi gravan efikecon. Se hodiaŭ, mi deziras sendi el Parizo grenon al Vladivostok, Japanujo ne povas tion malebligi. Se mi deziras sendi nutraĵojn al Japanujo, perŝipe, Rusujo povos tre malfacile tion malebligi. Japanujo konsideras monon kiel kontrabandaĵo, tamen li militas kun mono ricevita de Anglujo, kaj Rusujo uzas francan monon ! Por ke la reguloj pri kontrabandaĵo estu vere efikaj, la militantoj devus esti tute blokataj kaj apartigitaj de la cetero de l'mondo. Sed tiu blokado, farita kompreneble de la neŭtralaj regnoj, estus kaŭzo de multegaj konfliktoj kun tiuj regnoj kaj baldaŭ naskus universalan militon.

Ĉu la regnoj povas pli facile malpermesi la komercon de kontrabandaĵoj al siaj regnanoj ? Ni jam vidis ke Belgujo kaj Svisujo, neŭtralaj, malgrandaj kaj malfortaj regnoj, dezirante zorge observi neŭtralecon, kaj timante severajn venĝojn de la militantoj, se tiu neŭtraleco estus malrespektata, devis malpermesi ĉiun ajn eliron de armiloj, ekster siaj landlimoj. Tiu sola energia rimedo povas respektigi neŭtralecon kaj regulojn pri kontrabandaĵo. Sed ĉu oni povas praktike ĝin uzi ? Supozu ke hodiaŭ, la grandaj eŭropaj regnoj volante respekti neŭtralecon, kaj respektigi ĝin de siaj regnanoj, malpermesus ĉian eksteren sendon de nutraĵoj, trinkaĵoj kaj mono !

Tio haltigus la tutan ekonomian vivon de la mondo. Oni ne diru ke sufiĉus malpermesi la sendon difinitan speciale por militantoj, ĉar hodiaŭ mil rimedoj ekzistas por malobei tian malpermeson ! Tiel, en 1855, la hanovra ŝipo *Vrow Howina*

(1) Pri tiu demando, la germana revuo *Friedens-Warte* de aprilo 1905 enhavis tre interesan artikolon de aŭstra financisto kiu, pro sia alta situacio en la banka mondo ne permesis publikigi sian nomon. La artikolo, titolata « Militaj monpruntadoj », kaj subskribata C. M., estas tiam pli grava, kiam oni konas ĝian devenon : versimile, ĝi estis la unua kondamno de militaj monpruntadoj elveninta el la specialaj financaj rondoj.

En tiu artikolo, ni legas la jenan bonegan deklaron :

* Eĉ moralo ŝanĝas kun la tempo : ne la ŝteloj punis la Spartanojn, sed la mallertecon de tiu, kiu sin lasis kapti. Ni preparu la farigon de nova etiko :

* Ne nur kiu militas kontraŭ nia patrujo, sed ankaŭ kiu ajn militas, estas nia malamiko : subteni lin per mono, estas kulpiĝi pro krimo de ofendo de nacio. »

iris, kun ŝarĝo de salpetro, de Anglujo al Lisboa, de kie la ŝarĝo devas esti transportita en Hamburgon, por esti poste sendata en Rusujon !!

Rilate al sendo de mono, estas tre malfacile ankaŭ tute malpermesi tiun sendon al militanto. Sed tamen regno povas malpermesi pruntepetadon de militanto en sia lando. Tiu malpermeso estis cetere jam farita. Tre vere, ĝi ne malebligas la transsendadon (S-ro Delaisi, en la suprecitita artikolo, diras ke rusa caro ne estus povinta militadi, eĉ dum ses monatoj, se li ne estus povinta ĉerpi laŭvole monon el kaso de grandaj francaj financaj firmoj). Sed tamen, tiu malpermeso malfaciligas tiun monan helpon.

Ĉar hodiaŭ, oni ne nur permesas ofte tiun pruntadon, sed eĉ la registaroj uzas sian tutan influon por ke la regnantoj bonvolu prunti sian monon ! En franca vilaĝo, mi mem vidis la sekvantan fakton : S-ro B. . . , kiu ne kutimas sin okupi pri financaj aferoj, deziris procentedoni kelkajn milojn da francoj. Jam li aŭdis du financistojn, kiuj diris ke la pruntado al Brazilujo estis tre bona kaj tre profita. S-ro B. . . do rapidis telefoni al sia bankiero, petante ke li aĉetu brazilajn akciojn. La bankiero konsentis. Sed, la morgaŭan tagon, du oficistoj de la banko alvenis ĉe S-ron B. . . . Ili klarigis al li ke li bone farus, aĉetante akciojn rusajn, ĉar Rusujo estas granda, potenca kaj riĉa lando, ĉar ĝi povus nun prosperi ĉiam pli kaj pli, ĉar prunti al ĝi monon estus afero tre profita kaj tute senriska. Fine S-ro B. . . , konvinkita, aĉetis akciojn rusajn anstataŭ brazilajn ! !

Estus do tre facile ke la neŭtralaj regnoj ne plu tiel favorigu kaj helpu la pruntepetadon de militanto, kaj eĉ tute malpermesu tiun pruntepetadon.

IV

Kiel do konkludi tiun studadon ?

Absoluta, tuta neŭtraleco estas justa kaj dezirinda. Sed ĝi estas kimerio, ne realigebla praktike. Ni vidis, ke por ĝin efektivigi, estus necese ke neŭtralaj nacioj ĉesu ĉiujn rilatojn ekonomiajn, kaj eĉ ĉiujn eksteren sendadojn de komercaĵoj, kun la militantoj, kaj tio estas tre malfacila. Tamen, ni povas postuli neŭtralecon ĉiam pli severa kaj pli rigora.

Oni povas pli malfaciligi la neobservon de la reguloj de neŭtraleco, apliki tiujn regulojn al la sendoj de mono, kaj por

tio la malpermeso de monpruntado estas rimedo efika kaj dezirinda. Cetere tiuj problemoj pri neŭtraleco estas unuj el la plej malklaraj el ĉiuj tiuj de la juro internacia. Feliĉe, oni scias ke la konferenco de Hago esprimis la jenan deziron :

« La konferenco esprimas deziron ke la problemoj pri la rajtoj kaj devoj de la neŭtralaj regnoj estu enskribitaj en la programon de proksime venonta konferenco. » Tiel ni ne devas malesperi. Tamen, ĉar en la kongreso en Lille, la pacifistoj sin okupis pri la programo de tiu venonta konferenco, ĉar ili opiniis ke pacifismo povus havi influon pri la starigo de tiu programo, ili estus bone agintaj se ili estus enskribintaj en siajn dezirojn pri tiu afero, la malsimplan kaj malklaran problemon pri neŭtraleco kaj precipe la problemon pri la internaciaj monpruntadoj dum milito.

Gabriel Chavet.

LA SOCIETO

AVIZOJ DE L'PROVIZORA KOMITATO

Ĝenerala kunveno. — La tagordo de la ĝenerala kunveno, kiu fariĝos en Lucerno, la 21-an de septembro (esceptante ian ŝanĝon, pri kiu oni estus sciigata en Lucerno), estas :

- 1-e. Alpreno de la definitiva regularo.
- 2-e. Baloto de la Centra Komitato.
- 3-e. Diversaj demandoj pri la plivastigo de la Societo.

*

Tuŝante la regularon, la provizora komitato proponas la jenajn ŝanĝaĵojn :

A) — En la fino de artikolo 5-a, anstataŭ : « nur post kiam li donis », meti : « nur post kiam li estis ebligata doni ».

La foresto de la vortoj « estis ebligata » estas evidenta eraro : oni ne povas akcepti ke membro, kiu faris malhonoran agon, kaj estas invitata doni klarigojn, bezonus nur rifuzi ilin, por ke oni ne povu proklami lin ekŝiginta.

B) — Inter la artikoloj 8-a kaj 9-a, enmeti tiun novan 9-an artikolon :

« La titolon *membro honora* povas doni la Centra Komitato al personoj, kiuj faris grandan servon al la Societo. De tiuj membroj nenia kotizaĵo estas postulebla. »

Libraro pacifisma. — En la sama tempo, kiam nia Societo naskiĝis, l'*Internacia Instituto por la Paco* en Monako, presigis la *Historio resuma de l'Arbitracio Konstanta de Gaston Moch*, en lingvoj franca kaj esperanta ; kaj tiu verko aperis samtempe kun la unua numero de *Espero Pacifista*.

La komitato decidis sendi ĝin, kiel aldonon, al la membroj de la Societo, kaj konsideri ĝin la unua verko de la *Libraro pacifisma*.

Tuŝante tiun lastan, niaj projektoj estas grandaj : la demando estas, ĉu ni havos la monajn rimedojn por ilin efektivigi ?

Ni intencas eldoni, laŭ eblo, la oficialajn dokumentojn de la movado pacifisma, necesaj por ĉiu, kiu volas esti konscia partoprenanto kaj propagandisto, ne pasiva aprobanto.

Unue, tuj post la Lucerna kongreso, t. e. kiam nia Societo havos definitivan regularon, ni eldonos *Fundamentaj regularoj pacifismaj*. Tiu broŝureto enhavos la regularon de « Pacifisto », tiun de la Berna Oficejo, kaj tiun de la Universalaj Kongresoj.

Poste, estus tre utile eldoni la *Laŭtekstaj decidaĵoj de la 14 unuaj Universalaj Kongresoj por la Paco*, ĉar oni vere ne povas studi ian demandon rilatantan al la movado, se oni ne esploris la respondajn decidaĵojn de la Kongresoj. Sed tiu libro estas iom ampleksa, kaj superas niajn nunajn rimedojn...

Elie Ducommun, la sindona sekretario de l'Berna Oficejo, skribis iam broŝureton *Konduka fadeno tra la konsiliĝoj de la Kongresoj por la Paco*, kiu montras, per malmultaj paĝoj, la ĝeneralajn principojn, la esencon de la kongresaj decidaĵoj pri kelkaj plej gravaj demandoj. Ni petis lin, ke li bonvolu pleningi ĝin por ni, rilate al la plej malnovaj kongresoj.

Societaro pacifista kaj esperantista, t. e. libreto enhavanta geografian etaton de ĉiuj societoj kaj grupoj pacifistaj kaj esperantistaj, estus ankaŭ tre utila dokumento.

En preparo estas *Historio resuma de la Haga Konferenco*, de Emile Arnaud. Ni volonte eldonus ĝian esperantan eldonon, samtempe kiam aperos la franca. Same pri unu *Resumo de la eldiritaj sentencoj arbitraciaj*, de Henri La Fontaine.

Ni certe eldonos ankaŭ broŝuron pri la *Moderna milito kaj ĝiaj ekonomiaj kaj societaj konsekvencoj*, laŭ la teorioj de J. de Bloch, kiujn jam tiel terure pravigis la militoj en Transvalo kaj Manĉurio.

Eble la plej bona verketo por ĝenerala propagando estas *La milito kaj ĝiaj pretendataj bonfaroj*, de J. Novicow, eldonita france kaj jam tradukita en lingvon germanan de A. H. Fried. Nia kolego Chavet preskaŭ finis ĝian esperantan tradukon.

La *Rememoro pri Solferino*, de Henry Dunant, estas jam tradukita de Paul Fruictier.

Ni ne forgesos ankaŭ la beletristikajn verkojn, kiuj estas tre efikaj por la propagando. Ni petis jam aŭ petos la permeson traduki kaj eldoni *Milito kaj Paco*, de S-rino von Suttner ; *Kvar Tagoj* de Garŝin (jam tradukita de Kazi-Girej) ; *Soldato Peter Halket*, de S-rino Oliva Schreiner ; *La ruĝa rido*, de Leo-

nido Andrejef, k. c. Ni projektas ankaŭ la preparon de *Pacifisma antologio*.

Kaj, inter tiom da bonegaj verkoj, kiuj ĝenerale estis eldonataj nur en unu lingvo, tio ĉi estas nur malgranda parto de l'armilaro, kiujn ni volas doni al la pacifistaro.

Oni vidas kiom da utila laboro estas antaŭ ni, kiom da monaj rimedoj ni bezonas, kiel necese estas ke ĉia membro de « Pacifisto » faru sian devon, t. e. sendu al ni la kiel eble plej grandan kotizajon, kaj penu por aligi al la Societo kiel eble plej multajn membrojn !



Niaj societanoj en Boulogne-sur-Mer. — London, la 7-an, S-ro Moch kunvokis, laŭ propono de S-ro Barthel, la membrojn de nia Societo partoprenantajn en la Kongreso, kaj la aliajn kongresanojn kiuj sin interesas por la Pacifismo.

Al lia alvoko respondis multe da societanoj, kaj ankaŭ da kongresanoj, por kiuj ĝi estis okazo aliĝi al *Pacifisto*. Celo de tiu neoficiala kunveno estis nur interkonatiĝi, kaj interparoli pri la propagando, kiun ĉiu devas fari en sia aparta rondo, por helpi al la pligrandigado de nia Societo.

Ĉeestis 39 jam aligintaj aŭ novaj membroj de la Societo :

Angloj : S-roj Elliot, Gill, Hulme, F-ino Jones, S-ro Hulme, F-ino Lawrence, S-roj Maréchal, Millidge, Moscheles, Padfield, Rowe, Southcombe, Southee ;

Aŭstro : S-ro Simon ;

Belgo : S-ro Blondeel ;

Francoj : S-roj Blangarin, Cart, Denuit, Devoucoux, Fruictier, Gehet, Javal, Levillain, Meyer, Moch, Pourcines, F-ino Royer, S-roj Rondeleux, Sebert ;

Germanoj : S-roj Barthel, Hanauer, Kuchler ;

Hispano : S-ro Codorniu ;

Kanadano : S-ro Beauchemin ;

Svisoj : S-roj Borel, Privat, Schneeberger ;

Un. Statano : S-ro Matchett.

Plie 24 membroj de la Societo estis en Boulogne, sed ne povis veni al tiu ĉi kunveno :

Angloj : S-roj Elliott, Gray, Rhodes ;

Belgo : S-ro Seynaeve ;

Francoj : S-roj Boirac, Bourlet, Brunet, S-ino Cathiard, Chaussegros, Chavet, Derveaux, Deshays, Fromageot, Gasse, Lephay, Meunier, Michaux, Mossmann (kaj S-ino), F-ino Pannevin, S-roj Schweitzer, Sergeant ;

Ruso : S-ro Ostrovski.

Sume, krom eraro, 63 membroj de nia Societo, el 10 nacioj, partoprenis en la Boulogne'a Kongreso.

NOVAJ ALIĜOJ (ĜIS LA 15-a DE AŬGUSTO).

AMERIKO

KANADO

Montréal :

Beauchemin, A. P., stenografisto, 165, rue St-Denis.

UNUIGITAJ ŜTATOJ

Allston (Mass.) :

Matchett, C. H.

EŬROPO

AŬSTRUJO

Praha :

Atanasov, studento de muziko, VII-745.

Barth, Francisko, komercisto, VII.

Ung.-Hradisch :

Simon, Otto, profesoro.

BELGUJO

Bruxelles :

Carlos, Alf. Luis, tipografisto, 99-a, Chaussée d'Anvers.

Lecoïnte (F-ino), 248, avenue Brugman, Uccle.

Péruwelz :

de Roy, Gaston.

BULGARUJO

Pleven :

Avramov, Kosta K., komercisto.

FRANCUJO

Beaune :

Fromageot, Adrien, kuracisto, 4, rue de l'Hôtel-Dieu.

Bize, par Laferté (Haute-Marne) :

Hély, Victor, D-ro de literaturo.

Boulogne-sur-Mer :

Brunet, Eugène, poŝta oficisto, 5, rue du Bras-d'Or.

Derveaux, Maurice, limimposta oficisto, 73, rue Porte Gayole.

Lephay, Gaston, imposta oficisto, 27, route de St-Omer.

Pannevin, Louise (F-ino), instruistino, 73, rue des Vieillards.

Calais :

Denut, Léon, fabrikisto de piedvestoj, 121, rue du Château-d'Eau.

Dinard :

Crolard, Paul, eks-kapitano de artilerio.

Gouville (Manche) :

Laisney, R., abato.

Lachy, par Sézanne (Marne) :

Dreyfuss, Charles.

Nancy :

Frécot, Georges, inĝeniero, 37, rue St-Catherine.

Paris :

- Duviard**, Ferdinand, studento, 90, avenue Niel.
Javal, Emile, D-ro, membro de la Medicina Akademio, 5, boulevard de Latour-Maubourg.
Long, Elzéar, harkombisto, 40, rue de Moscou.
Royer, Cécile (F-ino), instruistino, 33 *bis*, rue Denfert-Rochereau.

Pont-à-Vendin (Pas-de-Calais) :

- Magniez**, Paul-Auguste, presisto.

Puteaux (Seine) :

- Aimé**, Emmanuel, profesoro, 3, rue Lemaître.

Rouen :

- Beaurain**, Narcisse, eks-bibliotekisto de l'Urbo, 12, rue des Forgettes.
Gehet, Alfred, studento, 10, rue de l'Ouest.
Levillain, C., instruisto, 22, rue St-Lô.

Saint-Omer :

- Fleury**, Félix, sekretario de la Komerca Ĉambro, urba konsilanto.
Bernard-Machin, tolajisto, 11, place du Vainquai.

Troyes :

- Doré**, Fernand, fabrikisto, konsilanto de l'ekstera komerco, 4, rue Jeanne-Darc.
Gaucher, Narcisse, prof. ĉe la Normala Lernejo, 55, rue de l'Hôtel-de-Ville.
Germaine, Albert, instruisto, Ecole du Ravelin.
Hauvion, Charles, fotografisto, 2, rue Champeaux.

Vesoul :

- Chaudey**, Gaston, urbestro.
Girardot, Maurice, 1, rue de la Gare.
Le Page, Louis, ĉefredaktoro de *l'Union démocratique*, 23, rue Carnot.

GERMANUJO**Frankfurt am Main :**

- Küchler**, Karl F., komercisto, Wiesenhüttenplatz, 30.

GRANDA BRITANUJO**Folkestone :**

- Southee**, Arthur Philip, profesoro, Edgumbe.

Ipswich :

- Padfield**, W. W., 22, Murray Road.

Keighley :

- Rhodes**, Joseph, ĵurnalisto, 54, Drewry Terrace.

Leeds :

- Maréchal**, F. L. G., profesoro, 82, Caledonian Road.

Leytonstone :

- Farnes**, Eveline (F-ino), 14, Percy Road.

Liverpool :

- Jones**, Margaret L. (F-ino), 44, Church Road, Stanley.

London :

Lawrence, E. A. (F-ino), 41, outer Temple, Strand.
Millidge, E. A., komercisto, 313, Friern Road, Dulwich, S. E.
O'Brien, E. (F-ino), 84, Petherton Road, Canonbury, N.

Nottingham :

Roove, F. G., 51, Portland Road.

Shrewsbury :

Holme, A. J.

West-Ealing :

Gill, L. A., Ingleside, Montagne Road.

Yeovil (Somerset) :

Southcombe, H. W., 15, the Park.

ITALUJO**Bordighera :**

Bicknell, Clarence (S-ino).

Milano :

Castoldi, Eligio, teatrisko, 8, viale Volta.

RUSUJO**Jalta :**

Ostrovski, J., kuracisto.

Kamenetz-Podolsk :

Ĉetverckov, G. (S-ino).

Varsovio :

Matuszevski, Tomasz, str. Aleja Szucha, N-ro 9-9.
Sylvester Dec, fervoja maŝinisto, str. Chmielna, N-ro 108-35.

SVEDUJO**Stockholm :**

Nordwall, Aug. Otto Leonard, 8, Bellmansgatan.

SVISUJO**Genève :**

Privat, Edmond, 10, Florissant.

Ŝanĝita adreso :

Bastide, Georges, el **Estrées-St-Denis**, al **Paris**, 240, rue St-Jacques.
S-ro Becher, Karl, Moselstrasse, 28, **Frankfurt a. M.**, Germanujo.
de Ladevèze, René, el **Hamburg**, al **Agen** (Francujo), 70, rue Lamouroux.
Willke, H., en **Gotha**, Leesenstrasse, 6, I.

Eraro :

En pago 34, urbo **Troyes**, nomo **Beuve**, *anstataŭ* : instruistino, *legu* : instruisto.

MONO RICEVITA ĜIS LA 15-a DE AŬGUSTO

Antaŭa stato . . . fr. 230.—

1-e Kotizajoj

Arnaud, Emile	5.—
Avramov, Kosta K.	10.—
Barthel, Carl	}
Becher, Karl	
Hanauer, J.	
Küchler, Karl F.	
Seidel, Alfred	
Bastide, Georges	8.—
Beaurain, Narcisse	5.—
Bernard-Machin	5.—
Beuve, Emile	}
Doré, Fernand	
Gaucher, Narcisse	
Germaine, Albert	
Hauvion, Charles	
Borel, Jean	7.50
Brunet	}
Delache	
Derveaux	
Lephay	
Pannevin (F-ino)	
Chaudey, Gaston	}
Girardot, Maurice	
Le Page, Louis	
Mossmann, P.	
Mossmann (S-ino)	
Christaller, Paul	7.50
Crolard, Paul	6.25
Derjaba, Paŭlo	5.—
Deshays	7.50
Dragumis, E. J.	5.—
Dreyfuss, Charles	5.—
Duviard, Ferdinand	5.—
Elliott, Mich. Jos.	5.—
Fleury, Félix	5.—
Fromageot, Adrien	5.—
Gasse, Emile	5.—

Transportote . . . fr. 354.25

Transportite . . . fr. 354.25

Gauche, Henri	5.—
von Gedda, Alma (S-ino)	5.—
Giambene, Luigi	5.—
Gray, Arthur	5.—
Jones, Margaret (F-ino)	5.—
Kuyda, Józef	5.10
Laisney, R.	5.—
Lecoite (F-ino)	5.—
Long, Elzéar	5.—
Magniez, Paul-Auguste	5.—
Mehlich, Adolf	5.—
Millidge, E. A.	5.—
Morizot, Pierre	5.—
O'Brien, E. (F-ino)	5.—
Ostrovski, J.	5.—
Pourcines, L.	5.—
Reeve, C. W. Thos.	5.—
Rhodes, Joseph	5.—
de Roy, Gaston	5.—
Royer, Cécile (F-ino)	5.—
Schmidt, Adolf	10.—
Serée, J. B. A.	5.—
Seydel, R.	5.—
Sidney-Nicholl	5.—
Simon, Otto	5.—
Škuburs, Henriko.	5.—
Southee, Arthur Philip	5.—
Strœle, H.	5.—
Sylvester Dec	5.—
Unzaga, Rufino	5.—
Vuillaume, A.	5.—

2-e Abonoj sen aliĝo

Holub, Jan	4.—
Magny	4.—
Scheerpelz, A.	4.—

**3-e Vendo de broŝuroj
en Boulogne 18.30**

SUMO . . . fr. 544.65

MIKSAĴOJ

I. MILITFAKTOJ KAJ ARMADOJ

Ekstrem-Orienta milito. — Paco ? — Dum la lasta monato, la sola milita fakto estis la okupo de insulo Sahalin, kiun la Japanoj plenumas sen gravaj bataloj.

Rajtigitoj estis fine nomataj por diskuti pri la paco. Tuj post la invito de prezidanto Roosevelt, Japanujo elektis S-rojn Komura kaj Takahira ; post iom longa ŝanceliĝo, la rusa registaro elektis S-rojn Witte kaj de Rosen. Kaj, en la momento kiam ni skribas, diplomatoj interkonsentas en Portsmouth (Unuigitaj Ŝtatoj).

La ĉiulanda gazetaro estas plena de komentarioj kaj aŭtaŭsupozoj pri la rezultato de tiu kunveno, kaj la ĝenerala inklino estas iom pesimista, ĉar oni konstatas ke la militema partio, en Peterburgo, refariĝis pli konfidema.

Ni notas nur, pasante, kaj kiel escepto, tiujn senfundamentajn diraĵojn. Neniu scias ion pri la instrukcioj, kiujn ricevis la rajtigitoj : kaj ni ĉiam zorge evitos imiti tiujn ĵurnalisistojn, kiuj, ju malpli ili konas la faktojn, des pli paroladas pri ili. Ni atendas senpacience kaj malĝoje la finon.

Ni rimarku ankaŭ ke, laŭ la lastaj telegramoj, « la diskutado estas malfacila, ĉar S-ro Witte uzas jen la rusan lingvon, jen la francan ; S-ro Nabokoff tradukas en anglan, kaj la japana sekretario tradukas al S-ro Komuro en japanan » !

Kiam la diplomatoj scios kaj uzos *Esperanton* !



Kosto de la batalo apud Cu-Ŝima. — Jen la bilanco de tiu tago, laŭ la pariza ĵurnalo *Le Temps* (10-a de junio).

La katastrofo de la 27-a de majo estas inter la plej sangaj en historio, kaj oni prave komparas ĝin kun tiu de la « nevenkebla Armada » en 1588, aŭ kun la ruinigo de la franca ŝiparo apud Trafalgar. El la 14 000 homoj, kiujn portis la 35 batalantaj ŝipoj, oni scias nun ke ĉirkaŭ 6000 estas, kiel kaptitoj, en Japanujo ; inter la 8000 ceteraj, oni povas supozi provizore ke unu milo sukcesis alveni en Vladivostok'n ; alia milo estas en Manilo kun admiralo Enquist ; 6000 estis mortigitaj aŭ dronis.

Tiuj nombroj memorigas la 7000 mortigitajn aŭ dronintajn apud Trafalgar, kaj la 10 000 homojn, kiujn perdis la « nevenkebla Armada ».

Tuŝante la materian perdaĵon faritan de Rusujo, oni taksas je 150 milionoj da rubloj la kostoprezon de la perditaj ŝipoj ; je 185 milionoj ilian veran prezon, pro la elspezoj konservaj kaj refaraj, de l'tago de la tempo ĝis tiu de batalo. Se oni aldonas la koston nekonatan, sed sendube tre grandan, de la vojaĝo de Kronstat al Cu-Ŝima, oni atingas sumon superantan 200 milionojn da rubloj, t. e. duonon da miliardo da frankoj !

II. POLITIKO INTERNACIA

Ĝenerala stato. — Kion ni diris pri la traktaĵoj por la paco, ni ripetos pri la nuna ĝenerala stato de l'internacia politiko.

De longa tempo, ĝi ne estis tiel konfuza kaj maltrankviliganta.

La franca-germana malkonsento, pri kiu ni parolas pli malsupre, ne estas plu akuta : sed la ĵurnalaj polemikoj daŭradas : la francaj gazetoj riproĉas al Germanujo ke, malgraŭ la promesoj faritaj la 8-an de julio, ĝi celis en Maroko apartajn profitojn, la konstruon de haveno en Tanger kaj de submara telegrafo, kaj prunton de mono al la sultano. La germana imperiestro kaj la caro kunvenis neatendite kaj mistere sur la Baltika Maro, apud Bjorko ; kaj, kvankam neniu ĉeestis al ilia interparolado, la spiritoj estas tiel ekscitataj, ke ĉiu ĵurnalo enhavas longajn artikolojn pri iliaj nekonataj paroloj. La ĵurnala polemiko angla-germana fariĝas ĉiutage pli viva, kaj la registaroj bedaŭrinde, per siaj agoj, liveras pretekstojn al ili. La germana ŝiparo, kaj ankaŭ l'imperiestro, vizitis la svedajn, norvegajn kaj danajn marbordojn, kaj oni supozas ke tiu estis protesto kontraŭ la rompo de l'unuigo sved-norvega. Tuj poste, kaj kiel Granda Britanujo volus respondi al la renkonto de ambaŭ imperiestroj, oni ekscias ke potenca britana ŝiparo, por la unua fojo, manovros en la Baltika Maro : kaj jen la germanaj ŝovinistaj gazetoj ekbruliĝas. Kaj ni ne parolas pri la grava malkonsento inter Aŭstrujo kaj Hungarujo, la ribelado en Kretujo kaj Arabujo, la senfina malpaco en Makedonio kaj Armenujo, la sangaj malordoj en tuta Rusujo, ktp.

Pri la detaloj de tiuj okazaĵoj ni ne povas raporti, pro manko de spaco, nek rezoni, pro manko de certaj sciigoj kaj profeta inspiro.

Ni ne kredas ke ili naskos militon, ĉar eŭropa milito estus io tiel terura, ke neniu prenus sur sin la respondecon pri ĝi. Sed ni devas konstati kiel maltrankvilaj estas nun la spiritoj en Eŭropo tuta, kaj serĉi la kaŭzon de tiu stato.

Tiu kaŭzo estas duobla.

Unue, tia estas la solidareco kiu interligas ĉiujn civilizitajn naciojn, ke la ekstrem-orienta milito, kvankam ĝi estas ĝustadire kolonia milito, kies abomenaĵoj fariĝas sur kampo malproksima po dek mil kilometroj, skuegis Eŭropon kaj Amerikon preskaŭ same, kiel la militantajn regnojn, tuŝante la korojn, danĝerigante la interesojn.

Kaj la dua kaŭzo estas tiu malaminda anarkia stato, kiun oni nomas « paco kun armado ». Tiel longe, kiel ĝi daŭros, tiel longe, kiel oni celos la pacon per la preparado de milito, la popoloj vivos en maltrankvileco, kaj ĉia loka ekskuo povos esti la signalo por ĝenerala, senantaŭula milito.

Ni laboru do por prepari la pacon sen armado, la organizitan, juran pacon, la veran Pacon.



Francujo kaj Germanujo. — La 8-an de julio, la franca ministro Rouvier kaj la germana ambasadoro princo Radolin interŝanĝis en Parizo la jenajn leterojn, kiuj finis la oficialan malkonsenton franca-germanan :

1-e. *S-ro Rouvier al princo Radolin.* — La registaro de la Respubliko konvinkiĝis, per la interparoladoj kiuj okazis inter la riprezentantoj de ambaŭ regnoj en Parizo kaj Berlino, ke la imperia registaro celos, ĉe la konferenco proponita de la sultano de Maroko, nenian celon kiu metus en danĝeron la rajtajn interesojn de Francujo en tiu lando, aŭ kiu estus kontraŭa al la rajtoj de Francujo, devenintaj el ĝiaj traktatoj aŭ interkonsentaĵoj, kaj harmoniantaj kun la sekvantaj principoj :

Regeco kaj sendependeco de l'sultano ;

Nepartigo de lia imperio ;

Ekonomia libereco, sen ia malegaleco ;

Utileco de policaj kaj financaj reformoj, kies enkonduko estus reguligata, por mallonga daŭro, per internacia interkonsento ;

Akcepto de la situacio kiun Francujo havas kontraŭ Maroko, pro la apudeco, laŭ longa limo, de Alĝerio kaj Maroko ; pro la specialaj rilatoj, kiuj devenas de ĝi, inter ambaŭ najbarlandoj ; kaj, fine, pro la speciala intereso, kiu rezultas el tio por Francujo, ke ordo ekzistu en la maroka imperio.

Sekve, la registaro de l'Republiko forlasas siajn primitivajn kontraŭparolojn kontraŭ la konferenco, kaj akceptas partopreni en tiu ĉi.

Subskr. : *Rouvier*

2-e. *Princo Radolin al S-ro Rouvier.* — Ĉar la estraro de l'Republiko akceptas partopreni en la konferenco proponita de la sultano de Maroko, la imperia registaro komisiis min certigi al vi ĝiajn buŝajn deklarojn, laŭ kiuj ĝi celos, ĉe la konferenco, nenian celon kiu metus en danĝeron... (*la sekvo, kiel en la antaŭa letero, ĝis la vortoj* : « ... ke ordo ekzistu en la maroka imperio »).

La estraro de l'Republiko kaj la imperia estraro konsentis : 1-e, revoki samtempe en Tanger'n siajn senditarojn, nuntempe en Fez, tuj kiam la konferenco estos kunveninta ;

2-e, konsili interkonsente, per siaj riprezentantoj, la sultanon, pri la starigo de la programo kiun li proponas al la konferenco, laŭ la fundamentoj montritaj en la leteroj interŝanĝitaj, la 8-an de julio 1905, inter la prezidanto de la ministraro, ministro de eksteraj aferoj, kaj la ambasadoro de Germanujo en Parizo.

Subskr. : *Radolin*

Tiel finiĝis malkonsento kies supraĵa punkto estis la vizito de imperiestro Guilelmo en Tanger', la 31-an de marto, Francujo akceptas la kunvokon de internacia konferenco por reguligi la marokajn aferojn, kiujn ĝi kredis reguligitaj per siaj interkonsentaĵoj kun Granda Britanujo, Hispanujo kaj Italujo ; sed Germanujo akceptas ĝian « specialan situacion » de najbarlando ; kaj tio, simile kiel la aliaj principoj konsentitaj en tiuj leteroj, troviĝis jam en la suprecititaj interkonsentaĵoj. Eble oni inklinos do diri, pri tiu epizodo, « multe da bruo pro nenio ». Sed kelkaj pensas ke oni ne povis fari tiom da bruo pro nenio. Ŝajnas al ili, ke Maroko estis nur preteksto, kiun Germanujo prenis por sciigi la regnojn pri la mezamaraj ambicioj de sia « monda politiko », kiu maltrankviligas speciale Francujon, Grandan Britanujon kaj Italujon *).

La estonto montros al ni ĉu ili pravas, ĉu tio ĉi estis nur momenta kaj jam pasinta interrompo de la alproksimiĝo franca-germana, kiu estis, antaŭe, videble prepariĝinta.

*

Kiel ajn estas, jen tre interesa retrospektiva dokumento pri tiu afero.

La 2-an de julio, la pariza ĵurnalo *Le Matin* publikigis la jenan deklaron faritan de princo Bülow, la 30-an de junio, al lia berlina korespondantisto S-ro de Maizière :

« Mi ne volas doni al kiu ajn sciigojn aŭ montrojn pri la

1. Pri tiu demando — la germana mondpolitiko — ni rekomendas tre ke oni legu la verketon de S-ro Delaisi, kaj la artikolon de S-ro Ular, pri kiuj ni parolas sub la rubriko « Libroj kaj artikoloj ».

nuna stato de la traktadoj, pri kiu la solaj riprezentantoj de ambaŭ registaroj devas esti informataj.

« Mi tamen povas diri al vi, kaj mi permesas al vi ripeti, ke oni erarus, en Francujo, supozante ke ni havus mi ne scias kiajn malantaŭ-pensojn pri kiuj via lando povus maltrankviliĝi.

« La germana diplomatio estas senartifika kaj sincera, kaj ĝi havas nenian alian celon, ol atingi, per rimedoj justaj, la pacan solvon de la nuna malkonsento, kiu jam tro longe daŭris.

« Mi persistas kredi ke la kunvoko de unu konferenco estas la vojo plej certa por eliri el situacio, *kiu estis* streĉita kaj danĝera pro pli ol unu kaŭzo, kaj por akordigi ĉiujn rajtajn interesojn. »

La granda intereso de tiu deklaro devenas el la maniero, kiel ĝi estis farata.

S-ro Maizière estis sendinta al la kanceliero projekton, kies unua frazo estis laŭlitere akceptata, kaj kies sekvo estis la jena (ni substrekas la vortojn, kiujn princo Bülow ŝanĝis) :

« ... Mi tamen povas diri al vi, kaj mi permesas al vi ripeti, ke oni erarus, en Francujo, supozante ke ni *sekvus mi ne scias kian militeman planon pri kiu* via lando povus maltrankviliĝi.

« La germana diplomatio estas *esence pacema* kaj sincera, kaj ĝi havas nenian alian celon, ol atingi, per rimedoj *juraj, justaj kaj ĝentilaj*, la pacan solvon de *malkonsento, kiu devas finiĝi laŭ la reciproka kontentiĝo de ambaŭ regnoj.*

« *Tiuj faras laboron neutilan kaj pereigan, kiuj ĝenas, per maltrankviligantaj juĝadoj, kiujn nenio pravigas, la normalan iradon de la traktaĵoj, kiuj devas esti daŭrigataj kun kvieteco kaj sincereco.* »

La komparo de ambaŭ tekstoj estas interesa. Sed la plej kurioza detalo estas ke, sur la korektita teksto, kiun oni reportis al S-ro Maizière, la vortoj *kiu estis*, presita per klinaj literoj sur la ĉi supra unua teksto, ne ekzistis : oni skribis nur : « ... por eliri el situacio streĉita kaj danĝera pro pli ol unu kaŭzo ... » S-ro de Maizière rimarkigis ke la legantaro konkludos el tiu teksto ke la nuna situacio estas streĉita kaj danĝera, kaj la kanceliero mem aldonis en la margenon, per krajono, la vortojn *kiu estis*.

Ĉu tio ne estas kurioza ekzemplo de politika kunlaborado de ĵurnalo kun registaro ?

Sed kia honto, ke la reciproka situacio de du plej civilizitaj, pacemaj nacioj, povis, dum kelkaj tagoj, esti « strekita kaj danĝera » pro la nekonataj kombinaĵoj de kelkaj diplomatoj ! Ni esperu, almenaŭ, ke l'abomeno kontraŭ tia politiko, ambaŭflanke montrita, instruis la « paŝtistojn de popoloj » !

Francujo kaj Granda Britanujo. — La « entente cordiale » (kiel oni nomas, eĉ en Anglujo, per internaciigitaj francaj vortoj, la koran konsenton inter ambaŭ nacioj), estas unu fortika elemento de la eŭropa politiko.

Per kurioza koincido, en la sama tempo, kiam la japanaj kaj rusaj rajtigitoj interdiskutas por la paco en la malgranda amerika urbo Portsmouth, la franca ŝiparo vizitis la britanan samnoman havenon, kaj la amikecaj elmontraĵoj faritaj en tiu okazo superis, se eble, tiujn, kiuj akceptis, unu monate antaŭe, la viziton de la britana ŝiparo en Brest.

El tiuj elmontraĵoj, ni devas atentigi pri la bela parolado, kiun faris ĉefministro Balfour, kiam la francaj oficiroj ricevis la senantaŭan honoron esti oficiale akceptataj en la Parlamento de Westminster. Li diris :

« Mi estas fiera paroli en la nomo de ambaŭ ĉambroj de l' Parlamento, por deziri bonvenon al niaj gastoj. Ni forgesu nun niajn partiajn dividojn. Ni forgesu ĉiujn kaŭzojn de hejmaj dissentadoj ; ni unuigu por prezenti niajn plej bonajn dezirojn, niajn plej varmajn gratulojn al tiuj, kiuj venas el la transmanka (1) lando. Tiu tago estas unu el tiuj, kiam granda nacio parolas nur unuvoĉe.

« Oni ĵus memorigis vin, ke ni kunestas tie ĉi en salono, kiu datumas de la tempo de l'filo de Guglielmo la Almlilitanto : ĝi datumas de okcent jaroj. Ĉu ne estas bedaŭrindaĵo pensi, kiel granda estas, inter tiuj jaroj, la nombro de tiuj, kiujn la loĝantoj de ambaŭ bordoj de la Maniko pasigis en reciproka suspektado aŭ militado, kaj kiel malgranda, tiu, kiun ili dediĉis al kora kunlaborado, al la sennuba amikeco ?

« Nun, sinjoroj, memorigante pri tiu estinto de senĉesaj konfliktoj, mi neniam parolos pri ĝi, kaj precipe hodiaŭ, kun tro profunda malĝojo ; ĉar, ĉiel, kion forgesis ambaŭ nacioj, ĝi estas la kaŭzo de tiuj konfliktoj, kaj kion ili memoras, estas nur la grandaj agoj, per kiuj ambaŭ fariĝis gloraj. Ĉu per la paco, ĉu per milito, ambaŭ nacioj neniam ĉesis plenumi, unu kontraŭ la alia, tra la centjaroj, en la kampo de la penso, de civilizado, de arto, de filozofio, reciprokane influon, por la plej granda profito de ambaŭ.

« Eĉ la malsameco de iliaj karakteroj faris la plej grandajn servojn al ilia reciproka nacia kulturo.

« Ekzistis, en historio, epokoj, kiam amikeca elmontraĵo inter du grandaj nacioj estis konsiderata kiel minaco por aliaj landoj ; epokoj, kiam oni ne povis imagi internacian amikecon, kiu ne celas malutili al triaj landoj. Tiuj epokoj apartenas nun al malproksima estinto. Tiu ĉi kunveno estas garantiaĵo de paco : paco en Oriento, paco en Okcidento, paco en la tuta mondo ! Ja, kia plej granda garantio de paco, ol la varma kaj ĉiama amikeco de du grandaj najbarnacioj, tro ofte kontraŭaj

(1) Manika Maro, nomo de la maro inter Anglujo kaj Francujo.

dum la estinto, sed kiuj, en la estonto, komprenos ke siaj intereso-
soj en la tuta mondo estas identaj, ke ekzistas inter ili nenia
kaŭzo de dissento, sed ke, kontraŭe, ili havas grandan mision,
mision kiun ili povos plej bone plenumi nur en la nunaj kondi-
ĉoj de paco ! »

Al tiuj noblaj paroloj ni aldonos nur la rimarkon, ke, an-
taŭ ne longe, kaj dum multaj centjaroj, la Francoj kaj Granda-
Britanoj estis konsiderataj, kaj sin konsideris mem, kiel la mo-
dela ekzemplo de « heredaj malamikoj ». Jam unufoje, dum la
regado de Napoleono la III-a, ili fondis ja « koran konsenton ».
Sed tiu konsento ne ekzistis en la koro de la nacioj, sed nur en
la registaroj, kaj ĝi estis fondata per kaj por milito. Nun, ĝi
vere meritas la nomon « kora », ĉar ĝi devenas el la konscia volo
de du liberaj kaj pacemaj popoloj.

La korojn de la Angloj tuŝis la franca admiralo Caillard,
per sia propramova kaj neatendita gesto, kiam, veturante en
Londono tra la placo de Trafalgar, li salutis la statuon de Nel-
son. Ni, pacifistoj, demandas la popolojn, ĉu ili intencas ĉiam
prepari aliajn buĉadojn, kiel Trafalgar, kies definitiva rezul-
tato, post unu centjaro, estas tia saluto ? Ĉu la aliaj nacioj ne
komprenos, fine, ke, laŭnature, ili estas heredaj amikoj, ne mal-
amikoj ?



Norvegujo sendependa; ĝiaj arbitraciaj traktatoj. —

La norvega popolo, demandita pri la rompo de l'unuigo kun
Svedujo, aprobis ĝin per 368,200 voĉoj kontraŭ 184. Tiu unu-
animeco estas des pli rimarkinda, ke la nombro de la voĉdonin-
toj estas tute nekutima : en la lastaj balotoj por nomi la depu-
tatojn, partoprenis nur 236,641 elektistoj. Oni povus da su-
pozi ke la norvega sendependeco estos baldaŭ oficiale ekkonata
de la regnoj.

Pri la diplomaciaj rilatoj de la regno, oni faris, en kelkaj
rondoj, demandon kiu ŝajnas al ni tute senobjekta : oni deman-
dis efektive, kio fariĝos la traktatoj arbitraciaj subskribitaj de
la sved-norvega registaro ? Kaj, se ni devas kredi la ĵurnaloj,
ia ministro diris ke la regnoj devos kontrakti novajn traktatojn
kun Norvegujo.

Tio estas tute malprava. Ne nur la traktatoj arbitraciaj,
sed ĉiuj traktatoj subskribitaj de la sved-norvega ministro de
aferoj eksteraj taŭgis, laŭ la ĝisnuna konstitucio, por ambaŭ
regnoj, kaj estis rajtigataj de la norvega parlamento, kiel de
la sveda. Ili restas do devigaj, kaj oni devas konsideri ke Nor-
vegujo, kiel Svedujo, estas ligata per arbitraciaj traktatoj kun
Belgujo, Francujo, Granda Britanujo, Portugalujo, Rusujo,
Siamujo, Svisujo kaj Unuigitaj Ŝtatoj.

Rumanujo kaj Turkujo. — Konflikto kiu, feliĉe, estas pace solvita, fariĝis inter Rumanujo kaj Turkujo. Osman-Paŝa « valio » (t. e. guberniestro) de Janina, arbitre arestis du rumanajn lerneajn inspektorojn kiuj tamen, posedis regulajn permesojn subskribitajn de la Granda-Viziro. Post protesto de la senditaro de Rumanujo en Konstantinoplo, la turka registaro donis, al la valio de Janina, ordonon liberigi ambaŭ inspektorojn. La valio rifuzis; la ministro de Rumanujo sin turnis al sultano mem, kiu donis novan ordonon de liberigo. Fine, la valio konsentis liberigi la rumanojn, elpelante ilin el la turka teritorio.

Post tiuj faktoj, la rumana registaro postulis ke la valio de Janina esprimu siajn bedaŭrojn, ke la du inspektoroj reiru Janina'n, kaj ke la Turka Sultano akceptu kiel justaj la postulojn de la rumanoj, loĝantaj en Turkujo, pri siaj rajtoj naciecaj. Helpita de Germanujo, Rusujo kaj Italujo, Rumanujo sukcesis kaj ĝiaj tri postuloj estis plenumataj de Turkujo.



Kreto. — La konsuloj de la « protektantaj » regnoj faris (23-an de julio) al la Kretanoj la jenan proklamon :

« Pro la persisto de la malorda stato en insulo Kreto, kaj la fakto ke armitaj bandoj daŭras, malgraŭ la antaŭaj avertoj, okupi la kamparon, la ĝeneralaj konsuloj de la protektantaj regnoj unuvoĉe proklamas, laŭ ordono de siaj registaroj, la jenon :

« 1-e. La neebleco de ia ŝanĝo en la politika kondiĉo de l' insulo, en la nunaj cirkonstancoj, estas ree certigata. Sekve, ĉia daŭrigo de la ribelado povas havi nenian efekton, ol ruinigi la insulon ;

« 2-e. Rea certigo estas donata pri la inklino de la regnoj, fari internajn reformojn, tiel ampleksaj, kiel oni juĝos necese por la progreso kaj bonstato de l'lando ;

« 3-e. Templimo da dek-kvin tagoj, de hodiaŭ, estas donata al la ribelantoj por senarmiĝi ;

« 4-e. Amnestio estas promesata al tiuj, kiuj obeos al tiu ordono antaŭ finiĝo de la supredirita limo, escepte en okazo de kulpo kontraŭ privata juro aŭ de forkuro el la ĝendarmaro ;

« 5-e. Manke de tiu submeto, la regnoj rezervas por si la rajton proklami tiujn partojn de la milita leĝo, kiujn ili juĝos necesaj, en la regionoj de la lando, kies stato ŝajnos al ili postuli ĝin. »

Oni povas dubi, ĉu tio sufiĉos por fini la ribeladon. Malŝaĝe estis, nome, escepti la ĝendarmojn el la amnestio, ĉar la ribelantoj versimile restos solidaraj kun ili. Sed, ĉiel, eĉ se la

ribelantoj senarmiĝos, morala paco ne fariĝos en la insuloj. Ne internajn reformojn postulas la Kretanoj, sed unuigon kun Grekujo. Kaj tio, ne nur pro sentimentalaj kaŭzoj, sed pro ekonomiaj, kiuj ĉiam estas pli fortikaj kaj daŭreblaj : tiel longe, efektive, kiel ili restos turkaj regatoj, ili estos sub la leĝo de la « kapitulacioj », kiu malebligas ian okcidentan organizon, kaj sub la turka limimposta tarifo, kiu malebligas iliajn naturajn rilatojn kun Grekujo.

*

De nia lasta numero, la Delegitaro de la francaj pacaj societoj decidis fine ke ĝi komunikigos al la franca registaro, kaj al la pacaj societoj de la koncernataj landoj, la decidaĵon de la Kongreso en Lille pri tiu demando.

ARBITRACIO INTERNACIA

Haga Kortumo : nova membro. — La svisa fedecia Konsilantaro nomis D-ron Eugen Huber kiel membro de la Kortumo, por anstataŭi S-ron Rott, mortintan. S-ro Huber estas profesoro ĉe la Universitato en Berno, kaj deputato.

☆

Haga Kortumo : la britana-franca proceso. — La arbitraciantoj, S-roj Henri Lammasch (Aŭstro), de Savornin Lohman (Holando), kaj Melville W. Fuller (Amerikano) ricevis, la 1-an de februaro, la pretendojn de la kontraŭuloj ; la 1-an de majo, iliajn kontraŭ-pretendojn ; la 1-an de julio, iliajn konkludaĵojn. La juĝo estis eldirata la 8-an de aŭgusto.

Jen la resumo de tiuj dokumentoj, laŭ duon-oficiala artikolo de la pariza ĵurnalo *Temps*.

Granda Britanujo plendis tial, ke la francaj konsuloj aŭ koloniaj estraroj permesas al enlandanaj ŝipoj (nomataj angle *dhow*s, kaj france *boutres*), kiuj komercas kun francaj kolonioj, porti la francan standardon, kaj sin malsubmeti, pro tio, je l'ekzameno de la britanaj militŝipoj.

Ĝi argumentis : 1-e, ke tiu permeso estas kontraŭa al la franca marvetura juro, kiu postulas kondiĉojn ne plenumatajn de tiuj ŝipoj ; 2-e, ke ĝi estas kontraŭa al la traktato de la 17-a de novembro 1844, inter Francujo kaj la maskata sultano pri la franca protektado de maskataj regatoj ; 3-e, ke ĝi estas kontraŭa al la Brusela interkonsentaĵo de la 2-a de julio 1890 pri la haltigo de la negrovendado, ĉar ĝi malfaciligas tiun haltigon ; 4-e, ke ĝi malrespektas la nedependecon de l'sultano de Omano, kontraŭ la deklaro de la 10-a de marto 1862, ĉar a) la maskataj maristoj sin eltiras el siaj naturaj leĝoj, kaj b) ili ne

akceptas la ekzamenon de la militŝipoj maskataj, — t. e. britanaj, ĉar Granda Britanujo igis la sultanon doni al ĝi, la 13-an de aprilo 1873, ekskluzivan rajton de polico kaj ekzameno sur la regnaj akvoj de Omano.

Fine, Granda Britanujo, daŭrigante tradicion kiu naskiĝis famajn malpacojn, postulis, pretekstante la haltigon de la negrovendado, la rajton ekzameni tiujn ŝipojn, malgraŭ ilia franca standardo.

Francujo respondis : 1-e, ke sia kolonia leĝaro, kontraŭe al la hejma, permesas la francigon de enlandanaj ŝipoj ; 2-e, ke la traktato de 1844 ne forprenas de ĝi tiun rajton tuŝante la maskatajn ŝipojn ; 3-e, ke tiu traktato, kiel antaŭ la kutimoj en kapitulaciaj landoj, donas al ĝi la rajton protekti la francigitajn maristojn, sur tero kaj sur la regnaj akvoj de Omano ; 4-e, ke Granda Britanujo mem akceptis tiun rajton, nome en 1898 kaj 1899, en Zanzibaro ; 5-e, ke la britan-francaj instrukcioj de la 1-a de junio 1867, interkonsentitaj inter ambaŭ registaroj, malpermesas l'ekzamenon de francaj ŝipoj en libera maro ; 6-e, ke la Brusela Interkonsentaĵo estis ĉiam respektata, escepte en unu okazo, kiun Francujo konfesas senartifike ; 7-e, ke la maskata sultano akceptis seninterrompe, ĝis 1900, agadon kiu daŭris de 1842.

Fine, Francujo forpelis la riproĉon, ke ĝi favorus la negrovendadon per la francigo de enlandanaj ŝipoj, kaj rimarkigis ke la estraroj britanaj kaj hindaj penas senĉese por starigi britanan protekton en Omanon, kontraŭe al la britana-franca deklaro de 1862.

Dank' al la bonegaj rilatoj inter ambaŭ regnoj, tiu malkonsento fariĝis sengrava. Sed, en la komenco de 1903, la stato ne estis la sama : la maskata registaro, laŭ konsilo de la britana konsulo, kondamnis tri francajn protektatojn, kies elliveron postulis la franca konsulo ; kaj tio okazigis inter ambaŭ riprezentantoj tre vivajn disputojn, eĉ minacojn. Feliĉe, venis la tempo de la « kora konsento » ; kaj, unu jaron post la britana-franca arbitracia traktato, la 14-an de oktobro 1904, la regnoj subskribis kompromison por prezenti tiun aferon al la Haga Kortumo.

Kvankam l'afero mem ne estas plu tre grava, estis interese doni tiujn detalojn, ĉar la sentenco estis juĝonta pri tri gravaj punktoj. Ĝi estis klarigonta, efektive, la protektan rajton, kiun ĝuas la regnoj eŭropaj en regnoj kapitulaciaj firmiĝanta malrekte, aŭ ne, la principon de la mara libereco ; fine, apogonta, aŭ ne, la britanajn pretendojn pri ekskluziva superrego sur la Persa Golfo kaj Omano.

La juĝo eldirata diras :

A) *Pri la rajto, por Francjo, permesi al Maskatanoj la uzon de la franca standardo :*

« 1-e. Antaŭ la 2-a de januaro 1892, Francujo havis la rajton permesi al ŝipoj apartenantaj al regatoj de Lia Moŝto la sultano de Maskato, uzi la francan standardon, ĉar ĝi estis ligata nur de siaj propraj leĝoj kaj administraj regularoj ;

« 2-e. La maristoj kiuj, antaŭ 1892, estis permesataj de Francujo uzi la francan standardon, konservas tiun permeson, tiel longe, kiel Francujo ĝin lasas al tiu, kiu ĝin ricevis ;

« 3-e. Post la 2-a de januaro 1892, Francujo havis la rajton permesi ke ŝipoj, apartenantaj al regatoj de Lia Moŝto la sultano de Maskato, prenu la francan standardon, nur sub la kondiĉo ke iliaj posedantoj aŭ mastroj pruvis aŭ pruvos ke, antaŭ la jaro 1863, ili estis konsiderataj kaj traktataj kiel francaj protektatoj. »

B) *Pri la rajto kaj ekzameno :*

« 1-e. La maskataj ŝipoj kiuj estis permesataj, kiel estis dirata pli supre, uzi la francan standardon, estas neviziteblaj en la regnaj akvoj de Maskato, laŭ la franca-maskata traktato de la 17-a de novembro 1844 ;

2-e. La permeso uzi la francan standardon ne povas esti transdonata al ia alia persono, nek al ia alia ŝipo, eĉ apartenanta al la sama posedanto ;

« 3-e. La regatoj de la maskata sultano, kiuj estas posedantoj aŭ estroj de ŝipoj permesitaj uzi la francan standardon, aŭ kiuj estas membroj aŭ parencoj de la maristaroj de tiaj ŝipoj, ĝuas, pro tio, nenian rajton de eksterregneco, kiu povus liberigi ilin de la regeco, speciale de la juĝeldiro de la maskata sultano. »

Kiel oni vidas, tiu sentenco proklamas la principon de mara libereco, malpermesante al Brianujo l'ekzamenon de francigitaj ŝipoj. Sed, praktike, ĝi donas al Granda Britanujo la superregon sur la omanaj akvoj ; la franca standardo, efektive, baldaŭ malaperos el tiuj regionoj, ĉar ĝi povas esti uzata nur de maristoj permesitaj antaŭ 1863, kaj ne povas esti transdonata.

MOVADO PACIFISMA

Berna Oficejo : Premio Narcisse Thibaut. — La Berna Oficejo fondis konkurson pri la jena objekto :

ARBITRACIO INTERNACIA

Kiujn kondiĉojn devas plenumi Arbitracio internacia por fondi plenan sistemon de justeldirado internacia ?

Kiuj internaciaj interkonsentaĵoj devas esti kontraktataj por ke tiu sistemo estu aplikebla al la naciaro ? kaj kiel oni atingos, kiel eble plej rapide, la subskribon de tiuj interkonsentaĵoj ?

La premio aljuĝota estas po 1500 frankoj. Oni povos doni, plie, honorajn citojn. La studo, kiu ricevos la premion, povos esti presata per elspezo de l'Oficejo.

Ĉiu persono povas konkuri.

La studoj, verkitaj en angla, franca aŭ germana lingvo, kaj ne subskribitaj, devos esti sendataj, ne post la 30-a de decembro 1905, ĉu al la Internacia Oficejo de la Paco (12, Kanonenweg, Berno, Svisujo), ĉu al la oficejo de S-ro Emile Arnaud, notario en Luzarches (Seine & Oise, Francujo).

Ĉia konkuranto skribos, je l'komenco de sia studo, du devizojn, kiujn li kopios sur folio enhavanta lian nomon, antaŭnomon kaj adreson, kaj aldonatan, sub sigelita koverto, al la studo.



14-a Universala Kongreso por la Paco, en Lucerno (19-a—23-a de septembro). — La oficiala cirkulero, kiu eliris la 3-an de aŭgusto, ebligas nin plenumi, per la jenaj detaloj, la sciigojn enhavantajn en nia unua numero.

La kunsidoj fariĝos en la « Kursaal », kiu troviĝas sur la bordmarŝejo de la lago, nomata « Quai National ».

La kongresanoj kiuj sin anoncos, antaŭ la 10-a de septembro, al la *Sekretariaro de l'organiza Komitato, Hôtel Victoria, en Lucerno*, ricevos per la poŝto sian eniran karton (ruĝan por delegitoj kun rajtigo voĉdonanta, bluan por la ceteraj).

Tiuj, kiuj ne anoncos sin antaŭe, ricevos sian karton ĉe la sekretario, kiam ili alvenos. Tie oni trovos ankaŭ karton por la festeno, kaj karton por la fervojoj, muzeoj, k. c., insignon, programojn kaj ĉiuspecajn sciigojn.

La sekretario estos, lundon la 18-an de septembro, de la 10-a horo matene, en la stacidomo. La 19-an, de la 8-a horo matene, ĝi estos en la Kursaal.

S-ro Moch, kiu estos, antaŭ la kongreso, en Engelberg (en la proksima ĉirkaŭaĵo de Lucerno), penos por aranĝi ke unu esperantisto estu ĉiam en la sekretariejo, en loko montrata de la subskribaĵo « Esperanto », aŭ de la verda stelo.

Ĉiuj faden-fervojoj de l'ĉirkaŭaĵo, la muzeoj, la panoramo akceptos la kongresanojn po rabata takso.

Pri la loĝejoj, oni povas sin turni de nun al la prezidanto de la Loĝeja Komitato, S-ro Zimmerli. Ĉambroj troviĝos po 4 frankoj por unu nokto kun matenmanĝo, kaj nemultekostaj ĉambroj kun la tri manĝoj.

*

Jen la artikoloj de la *Regularo de la Kongresoj universalaj por la Paco*, kiuj koncernas la aliĝojn kaj la rajtigon de la aliĝintojn :

Art. 1-a. La Kongresoj universalaj por la Paco konsistas :

a) El la delegitoj de la Societoj por la Paco ;
b) El delegitoj de publikaj Institutoj aŭ de oficialaj Estraroj, kiuj sciigis l'Internacian Oficejon de la Paco pri sia deziro helpi ĝiajn penojn ;

c) El delegitoj de Societoj, kiuj ne havas Pacon kiel celon esencan, sed aliĝis al l'Internacia Oficejo de la Paco, komunikante al ĝi sian regularon almenaŭ ses semajnojn antaŭ la kongreso ;

d) El membroj de la Societoj por la Paco, ne delegitaj, sed aliĝintaj al la Kongreso.

Art. 2-a. Ĉia Societo por la Paco, kaj ĉia aliĝinta Instituto publika aŭ oficiala Estraro, havas la rajton sin riprezentigi, ĉe la Kongreso, de unu delegito kun rajtigo voĉdona, se ĝi sin anoncis al la organiza komisiitaro de l'Kongreso antaŭ la komenco de tiu ĉi lasta.

Art. 3-a. — Plie, ĉia Societo por la Paco ricevas tiom da voĉojn, kiomoble ĝi enhavas 100 membrojn, laŭ la skriba deklaro de sia sekretario, kaj tio, ĝis la maksimumo de 10 voĉoj, ĉia partumo de 100 membroj estante kalkulata por 100 membroj.

Art. 4-a. — La depago de ĉiu Societo por la elspezoj de l'Kongreso estas po 10 frankoj por la unua delegita voĉo, kaj 5 frankoj por ĉia cetera voĉo.

Art. 5-a. — Ĉia privatulo, membro de ia Societo por la Paco, havas la rajton sin enskribigi kiel membro de la Kongreso, sed nur kun rajtigo konsiliĝa. La organiza komisiitaro povas postuli depagon de tiuj membroj laŭ la bezonoj. Tiu depago ne povas superi 5 frankojn.

La Societoj kiuj ne havas Pacon kiel celon esencan (Art. 1-a, c) estas akceptataj kun rajtigo voĉdonanta, sed ĉia inter ili ricevas nur unu voĉon.

Art. 6-a. — Neniu povas disponi, en la Kongreso, pli ol 10 voĉojn.

Art. 7-a. — La publiko estas, kiel eble, permesata ĉeesti ĉe la kunsidoj, sed sen rajto partopreni en la diskutadoj.

Art. 8-a. — La kontrolo de la rajtigoj fariĝas antaŭ la malfermo de l'Kongreso. Ĉia rajtigita delegito ricevas unu enirkarton, kies koloro montras la nombron da voĉoj, kiun li disponas.

*

Laŭ la unuaj ricevitaj sciigoj, ni esperas ke en la Lucerna Kongreso partoprenos jenaj inter niaj kunsocietanoj :

- Aŭstro* : S-ro Fried ;
- Belgo* : S-ro Houzeau de Lehaie ;
- Francoj* : S-roj Arnaud, Bokanowski, Cart, de Ménil, Meunier, Moch, S-ino Moch, S-roj Pichot, Pourcines, Spalikowski ;
- Germano* : S-ro Hanauer ;
- Grand-Britanoj* : S-roj Elliott, Gill, Moscheles, F-ino Peckover ;
- Greko* : S-ro Dragumis ;
- Kanadano* : S-ro Beauchemin ;
- Svedo* : S-ro Wawrinsky ;
- Svisoj* : S-roj Borel, Privat, Schneeberger ;
- Unuigano* : S-ro Matchett.

Ni esperas ke tiu etato, kiu enhavas jam 24 nomojn, el 10 nacioj, estos tre malplena, kaj ni donas rendevuon al ĉiuj amikoj niaj en Lucerno !

☆

Decidaĵoj de la tria Kongreso nacia de la francaj Societoj por la Paco en Lille.

Nunaĵaj demandoj :

La Kongreso,

Tuŝita de la daŭro de la *japan-rusa milito*, kies teruraĵoj ne ĉesas konfuzi tiel profunde la konsciencon de la popoloj civilizitaj ;

Rememorigas al la kontraŭbatalantoj kaj al la neŭtroj la promesojn precizajn, kiujn ili interkonsentis, subskribante la Interkonsentaĵon de Hago por la « paca reguligo de la internaciaj konfliktoj » (art. 3-, 7- kaj 20-a) ;

Vokas la atenton de la registaroj al la grandega petskribado komencita ĉe multaj landoj por atingi la ĉesigon de la malamikaĵoj, kaj kiuj, en Franclando, Itallando, Aŭstrolando, Holando kaj en Svislando, jam kolektis pli ol 500,000 subskribojn.

La Kongreso,

Konsiderante ke dum la pasinta jaro, Ruslando kaj Japanlando multfoje eldonis, en neŭtraj lando, *prunteprenojn por milito*, kiuj estas pagitaj de publika monoferado ;

Konsiderante ke tiuj pruntoj faras efektivan helpon al la batalantoj, kaj donas al ili la rimedojn por plilongigi la bataladon, kaj ke tiaj agoj estas kontraŭaj, se ne al la nuna rajto internacia, almenaŭ al la ideo de vera neŭtreco ;

Deziras ke la regnoj neŭtraj, per internacia konsento, malpermesu sur siaj teritorioj, la publikan eldonon de pruntepreno de la ŝtatoj batalantaj.

La Kongreso,

Konsideras la deziron prezentitan de la komisiitaro A pri la *rimedoj uzitaj de iaj registaroj por starigi la kursojn dum la daŭro de milito* ;

Resendas la ekzamenon de tiu deziro al la 4-a kongresonacia, kiu devos ekzameni la konsekvencojn, internacie kaj pacifiste, de la regnaj prunteprenoj faritaj alilande.

La Kongreso,

Konstatas la karakteron pure paceman de la interkonsentaĵoj subskribitaj inter Franclando, Britlando kaj Hispanlando, precipe pri tio, kio koncernas *Marokon* ;

Konstatas la elmontrojn ripetitajn de la pacema volo de l' popoloj, kaj la deklaraĵojn konformajn de l' registaroj

Kaj rememorigas ke la « paca penetrado » ne povus, je ia momento kaj ion pretekstante, kaŭzi armitan intermetiĝon, kaj ofendi la principon de la komerca libereco.

La tria kongreso,

Tre tuŝita de la informoj pri la *malbontraktado de enlanduloj* en la kolonioj ;

Konstatas ke la publika opinio ne povas plu akcepti la ekziston de tiaj skandaloj ;

Konstatas la penon faritan de Franclando, per la sendo en Afrikon la misiitaron Brazza ;

Esperas ke la eŭropaj regnoj scios antaŭzorgi por ke faroj similaj ne povu rekomenciĝi.

En la momento kiam la Kreta parlamento ĵus unuanime voĉdonis por la *unuigo de Kreto kun Greklando*, post pli ol dek jaroj de batalado farita de la loĝantoj, por ricevi la patrujon, kiun ili elektis ;

La Kongreso esperas ke oni antaŭzorgos por ke, la Francaj taĉmentoj, senditaj en Kreton por protekti la loĝantaron, ne estu devigataj konservi perforte staton kontraŭan je la volo de tiu loĝantaro.

La Kongreso,

Memorigas kun plej viva kontenteco la parolojn diritajn de reĝo Vittorio-Emmanuele la III-a, de S-ro Prezidanto kaj S-ro Ministro de la alilandaj aferoj de la Franca Respubliko, ĉu en Napoli la 30-an de aprilo 1904, ĉu en Parizo dum novembro 1904, el kiuj rezultas ke, *Franclando kaj Itallando* konkludis interkonsentaĵojn reguligantajn sian situacion en Mezamaro, kiuj kreis « unuigon ekster ĉia sortovico... lasantan lokon, en iliaj rilatoj, nur por reciprokaj amikeco kaj bonvolo. »

La Kongreso,

Pensante ke la *eksportado de militaj armiloj* al la regnoj ekster-eŭropaj faras por la civilizacio kaj eĉ por la sendanĝereco de Eŭropo, danĝeron tre grandan kaj urĝan ;

Petas la Francan registaron, por ke ĝi proponu al la eŭropaj nacioj la malpermeson de l'eksporto, eksteren de Eŭropo, de militaj armiloj.

*

Traktatoj arbitraciaj.

La Kongreso sendas al S-ro Ministro de la alilandaj aferoj la esprimon de sia tre viva dankeco pro la subskribo de traktatoj arbitraciaj inter Franca Respubliko, Britlando, Unuigitaj Ŝtatoj, Itallando, Hispanlando, Sved- kaj Norveglando, Svislando kaj Holando, t. e. kun sep regnoj, inter kiuj kelkaj grandaj regnoj.

La Kongreso petas insiste la Registaron por ke ĝi pligrandigu kiel eble plej baldaŭ la reton de la traktatoj arbitraciaj inter Franclando kaj aliaj regnoj. Ĝi speciale deziras la rapidan faradon de traktatoj tiel ĝeneralaj, kiel estos eble ilin ricevi de la kontraktantaj regnoj, por kiel eble plej granda daŭro, kaj sendire renovigeblaj, kun Ruslando (kiu jam sin ligis al Belglando, Sved- kaj Norveglando kaj Danlando), kun Aŭstro-Hungarlando, Belglando, Danlando, Portugallando, Romanlando, Greklando, Japanlando, Hinlando, kaj ĉiuj Respublikaj regnoj.

*

La proksima Konferenco en Hago.

La Kongreso deziras ke, laŭ artikolo 19-a de la Internacia Interkonsentaĵo de 1899, la dua konferenco en Hago fondu, inter la regnoj kontraktantaj, *traktaton por deviga kaj konstanta arbitracio*, pri ĉiuspecaj kaŭzoj de malkonsento.

La Kongreso deziras ke la dua konferenco en Hago ekstudu la demandon pri *kreo de internacia leĝdonanta delegitaro*, oficiala kaj konstanta, ekzemple per aliformigo de la Interparlamentara Konferenco.

La Kongreso deziras ke la interkonsentaĵo fondota de la proksima konferenco en Hago restu malfermata por la *aligo de ĉiuj ŝtatoj*, kiuj ne estus partoprenintaj al tiu konferenco, kaj tio konforme je la artikolo 60-a de la Interkonsentaĵo de 1899.

La tri antaŭaj decidajoj estos, de la komitato de tiu kongreso, sendataj al la Kongresoj naciaj por la Paco kiuj okazos en aliaj landoj antaŭ la kunveno de la dua konferenco en Hago. Ili estos ankaŭ sendataj al la Kongreso internacia por la Paco, kiu okazos en Lucerno en septembro 1905, kaj al la proksima Interparlamentara Konferenco ; kaj tiujn diversajn kongresojn oni petos por ke ili eldonu konformajn decidajn, sendotajn al la prezidanto de la dua konferenco en Hago per la Internacia Oficejo por la Paco, en Berno.

La Kongreso,

Konsiderante ke arbitraco povas esti reale devigata, nur se la ĝenerala promeso farita de la traktintaj regnoj efektive starigas arbitracion en ĉiuj apartaj malkonsentoj, kiuj ne estas solveblaj interkonsente ;

Deziras ke la dua konferenco en Hago fondu la *raĵon* por regno *alvoki* alian regnon, ke ĝi preparu la kreon de komuna organo propramove agonta, en determinitaj okazoj, por intereso de tio, kion la unua konferenco en Hago nomis la « societo de la civilizitaj nacioj ».

La Kongreso,

Rememorigante ke la regnoj subskribintaj la Interkonsentaĵon en Hago akceptis deklaron celantan « la *malpermeson ĵeti kuglojn kaj eksplodaĵojn el aerostatoj, aŭ per aliaj novaj similaj manieroj* », kiu devas efektiviĝi nur dum kvin jaroj ;

Petas la duan konferencon en Hago, por ke ĝi renovigu tiun deklaron ne limigante ĝian daŭron, kaj por ke ĝi pligrandigu la kampon de similaj malpermesoj.

La Kongreso,

Rememorigas ke la Konferenco de 1899 deziris ke kelkaj demandoj « estu enskribataj en la *programon de posta konferenco* ».

Inter tiuj demandoj, la Kongreso speciale atentigas la jenajn al la publika opinio, kaj ilin rekomendas al la atento de la proksima konferenco en Hago, kiel al la zorgemo de la registaroj.

« La Konferenco (en Hago, 1899) deziras :

« Ke la registaroj, observante la proponojn faritajn en la Konferenco, ekstudu la eblecon de interkonsentaĵo koncernanta la limigon de la teraj kaj maraj armeoj, kaj de la militaj budĝetoj ;

« Ke la demando pri la rajtoj kaj la devoj de la neŭtroj estu enskribita en la programon de proksima Konferenco ;

« La Konferenco, konsiderante la antaŭajn klopodojn faritajn de la Svisa Federacia Registaro por la reesploro de la Interkonsentaĵo en Genevo deziras ke oni baldaŭege kunigu specialan konferencon, kiu devos ekzameni denove tiun Interkonsentaĵon ;

« Ke la propono celanta la netuŝeblecon de la privata propraĵo dum mara milito estu sendata al l'esploro de posta konferenco ;

« Ke la propono por reguligi la demandon pri bombardado de havenoj, urboj kaj vilaĝoj, de ŝiparo, estu sendata al esploro de posta konferenco ;

« Ke la demandoj rilatantaj al la pafiloj kaj ŝipkanonoj, kiujn ĝi esploris, estu ekstudataj de la registaroj por atingo de interkonsento pri la ekuzado de novaj modeloj kaj kalibroj ».

*

Plimalgrandigo de la armeaj ŝarĝoj.

La Kongreso,

Deziras ke la Franca Registaro ordonu la studon plej atentan de la organizado de l' Svisa armeo ; — de la morala instruado, kaj de la korpa fortikigo, kiuj igis ĉi tiun organizadon ebla kaj efika ; — kaj de la kondiĉoj, laŭ kiuj oni povus alfari similajn instituciojn al la bezonoj de la nacia defendado.

Pro konsidero de la projektoj de armado en *Hindo-Hinlando*, konatigitaj de novaj parlamentaj diskutadoj, la Kongreso opinias ke, konforme je la sciigoj enhavataj en la verko « *Principoj de koloniigado* », de S-ro de Lanessan, eksguberniestro ĝenerala de *Hindo-Hinlando*, kaj la raporto de S-ro Antonin Dubost, ĉe la Senato, pri la budĝeto de 1905, la sendanĝerecon de Franca *Hindo-Hinlando* oni devas serĉi en la bona agado kontraŭ la enlanduloj, en la respekto de iliaj moroj kaj institucioj kaj en la plibonigo de ilia morala kaj materiala stato ; fine, en politiko, kiun ili faros fidelaj ligatuloj, kaj ne malkontentaj regatoj de *Franclando*, pli ol en la ruinigantaj armadoj kiuj, en okazo de atako, estus iluziaj, se la korpuso de okupado devus batali kontraŭ dudekkvin milionoj de loĝantoj ribelantaj kontraŭ la Franca potenco.

La Kongreso,

Konsiderante ke *Franclando* neniam intencis ataki *Itallandon* ;

Ke ambaŭ regnoj subskribis traktaton arbitracian, plenigitan de interkonsentaĵo tre grava koncernanta la laboristan leĝaron ; ke ili respondis inter si la regadon de kora interkonsento kaj de reciproka konfido, al kiu ilin invitis ilia tuta estinteco ;

Deziras ke la Registaroj Franca kaj Itala pruvu siajn intencojn vere amikajn, haltigante aŭ malpliiĝante la multekostajn rimedojn por defendiĝo, kiujn ili kontraŭstarigas reciproke.

Konsiderante ke milito inter *Franclando* kaj *Itallando* fariĝis malkredinda ;

Konsiderante ke multaj loĝantaroj en ambaŭ landoj, antaŭvidante tiun hipotezan militon (kiu, cetere, ne okazis, dum pli ol unu homvivo), suferas en sia ĉiutaga vivo kaj en la pligrandigo de sia bonstato pro la malpermeso konstrui vojojn ligantajn ne nur ambaŭ landojn sed ankaŭ urbojn aŭ vilaĝojn en unu sama lando ;

Konsiderante ke, eĉ en hipotezo de nekredebla konflikto, la rimedoj por detruado sufiĉus malebligi ke la komunikiloj kreu danĝeron por la nacia defendo ;

La Kongreso deziras :

Ke ĉia malpermeso celanta la fondon de la *komunikiloj en la regionoj proksimaj de la Franc-Itala landlimo* estu nuligita de la Franca kaj Itala registaroj.

*

Ekonomaj kaŭzoj de la militoj.

La Kongreso deziras ke la fondaĵo de Bloch, la Internacia Oficejo en Berno aŭ la Internacia Instituto por la Paco eldonu tabelon de desegnaĵoj, kun klariganta teksto pri la *kaŭzoj de la militoj*, kaj nome pri iliaj ekonomiaj kaŭzoj, montrantan flanke ilian koston pri homoj kaj pri mono, kiel iliajn ekonomiajn konsekvencojn.

(Daŭrigota.)

☆

Dua britana Kongreso de la Paco, en Bristol. — Jen estas la decidaĵoj de la dua nacia kongreso de la anglaj Societoj por la Paco, kiu fariĝis en Bristol la 28-an kaj 29-an de junio 1905 :

La Kortumo en Hago kaj la novaj traktatoj. — La Kongreso kontente konstatas ke dum la dekdu monatoj, kiuj ĵus pasis, traktatoj arbitraciaj estis konkludataj de la britana Registaro kun Germanujo, Svedujo-Norvegujo, Portugalujo, Svisujo, Aŭstrujo kaj Holandujo ; kaj samspecaj traktatoj estis konkluditaj inter Francujo kaj Svedujo-Norvegujo, Francujo kaj Hispanujo, Hispanujo kaj Portugalujo, Francujo kaj Holandujo, Belgujo kaj Rusujo, Belgujo kaj Svedujo-Norvegujo, Aŭstrujo kaj Svisujo, Rusujo kaj Svedujo-Norvegujo, Svisujo kaj Svedujo-Norvegujo, Francujo kaj Svisujo, Danujo kaj Rusujo, Svedujo-Norvegujo kaj Portugalujo, Italujo kaj Peruujo, Danujo kaj Belgujo. La kongreso ĝojas pri tiu nova pruvo de la celado kiun havas la nunaj regnoj uzi la juran procedon por solvi la internaciajn malkonsentojn. La Kongreso egale kontente konstatas, ke, de la lasta jaro, la Kortumo en Hago solvis la malkonsenton ekzistantan inter Francujo, Germanujo kaj Granda Britanujo, unuflanke, kaj Japanujo, aliflanke, rilatan al la taksoj postulotaj pro la konstruaĵoj en Japanujo, kaj ke la malkonsento inter Francujo kaj Granda Britanujo, rilata al Maskato, estis prezentita al tiu Kortumo.

Gojante ĉar multaj aliaj internaciaj malkonsentoj estis amike solvataj, de la rimedo de arbitracio, la Kongreso insistas, antaŭ la Registaro de Lia Reĝa Moŝto, pri tiu fakto ke estus dezirinde ke ĉiuj demandoj malfacile solveblaj de la ordinara rimedo de diplomatio, estu prezentataj al la Kortumo en Hago.

*

La okazintaĵo en la Norda Maro. — La Kongreso kontente konstatas ke la atako de la ŝipoj en la Norda Maro, farita de la rusa ŝiparo en lasta oktobro, estis objekto de enketo farita de internacia komisiitaro, nomita sekve la sistemo antaŭ-

preparita de la Interkonsentaĵo en Hago. La Kongreso ĝojas ĉar tiel, danĝero de milito inter Granda Britanujo kaj Rusujo estis forigata, kaj ĉar nova progreso estis realigata en la paca solvado de internaciaj malkonsentoj, per praktika aplikado de tiu nova proceduro, kies ekzemplo estos, sendube, sekvata, en la estonto.

*

La milito kaj la misioj. — La Kongreso, opinante ke grava estas la situacio de la kristanaj misiistoj, predikantaj la instruadojn de Kristo en la nekristanaj landoj, kaj konsiderante la celadon kiu ekzistas en kelkaj el tiuj landoj, konsideri la propagandon de la misiistoj kiel helpanto de politiko militista atakema, insiste petas de ĉiuj misiistoj loĝantaj en fremdaj landoj, ke ili evitu fari ĉiun ajn atakon kaj pruvu, per ilia instruado, kaj per la ekzemplo kiun ili donas, la pacan karakteron de Evangelio kiun ili entreprenis prediki.

*

La militarismo en Hindujo. — Car la vera protekto de Hindujo konsistas havi popolon kontentan kaj prosperantan, kun bonvolantaj najbaroj trans la landlimoj kaj sufiĉe plenan kason, la nuna politiko de militistaj elmontraĵoj malsaĝaj kaj de atakemo, kaŭzas grandan danĝeron al la senriskeco kaj al la bonstato de la imperio, pligrandigante troe la ŝarĝojn de la hinda nacio, ekscitante malamikecon inter la popoloj kaj inter la gentoj ĉe la landlimo kaj senmezure elspezante la enspezojn de la lando. Por la intereso de Hindujo kaj de Granda Britanujo, estas do esence, malebligi tiun spiriton de atakema militarismo, metante la politikon ka la militistajn elspezojn, pli efike sub la kontrolo de Parlamento kaj de la civilaj aŭtoritatoj ; disdividante justamaniere inter la butĝeto de Hindujo kaj tiu de Imperio la militistajn elspezojn de hinda Imperio, kaj donante al enlanda depaganto de impostoj, justan influon en la financa administracio de lia propra lando.

(Daŭrigota)

☆

Novajoj pri la Societoj. — *Internacia Medicina Societo kontraŭ milito.* Tiu societo kunvenis en ĝenerala kunveno la 24-an de junio, en sia societa sidejo, 25, rue des Mathurins, Parizo, sub la prezido de doktoro J. Rivière.

Multaj medicinistoj, de multaj nacioj partoprenis tiun kunvenon.

La kunvenantoj, sendis gratulojn al prezidanto Roosevelt ; proklamis ke la pacaj celadoj de la Societo tute respektas la noblan ideon de Patrujo kaj neniel celas la demandon pri senarmigo, kaj fine, aprobis unuvoĉe la jenajn dezirojn :

1-e. En la internaciaj konfliktoj, la regnoj faru la intercedojn kiujn komuna saĝo postulas.

2-e. En la okazo de milita konflikto, la militagoj ne novu komenci sen, *antaŭe*, alproklamo de milito.

3-e. Estus saĝe kaj humane postuli internacian kontrolon pri la fabrikado de armiloj kaj eksplodiloj nunaj.

4-e. La internaciaj problemoj estu solvataj de du juĝistaroj : juĝistaro internacia kaj juĝistaro humana ; la unua sin okupos pri la internaciaj konfliktoj, kaj la dua, pri la demandoj rilataj al ordo internacia kaj humana.

*

Senatano d'Estournelles de Constant, prezidanto de la *Franca Grupo Interparlamentara por internacia arbitracio*, fondis novan societon, kun titolo : *Komitato por la defendo de la naciaj interesoj kaj de internacia akordiĝo*. La devizo de tiu societo estas *Pro patria per orbis concordiam* (por la patrujo per la harmonio de l'mondo). La honoraj prezidantoj estas S-ro Berthelot, senatano, membro de la Franca Instituto, kaj Léon Bourgeois, deputato, eksmembro de la Konferenco en Hago.

Tiu societo celas :

1-e, instruadi la opiniantaron, kun la helpo de la instruistaro.

2-e. Korektigi la neĝustajn informojn, propagandatajn por ke opiniantaro eraru. La membroj de la societo, bone informataj kaj interligitaj, helpas la konservon de la paco, dank' al sia influo sur publika opinio, sur gazetaro, sur parlamentoj kaj eĉ registaroj.

3-e. Plimultiigi la rilatojn inter diverslanduloj.

4-e. Okazigi internaciajn vojaĝojn kaj vizitojn, kaj faciligi sciencajn alvojaĝojn.

5-e. Helpi la praktikadon de fremdaj lingvoj.

6-e. Favorigi la interŝanĝon de infanoj kaj trovi oficojn en fremdaj landoj, al rekomendindaj junuloj.

7-e. Eldoni specialan revuon.

8-e. Krei en multaj urboj, domon, hejmon por la fremduloj, kiu estos centra loko por kunvenoj, paroladoj, kongresoj, ekspozicioj, ktp.

*

Alia internacia societo estas fondita de S-ro Thomas Barclay, eksprezidanto de la angla komerca ĉambro en Parizo. Tiu societo estas titolata *Fraternitas inter gentes* (t. e. « Frateco inter popoloj »), kaj nomata per la ĉefliteroj : F. I. G. Nenia kotizaĵo estos postulata. La membroj nur devos porti insignon bluan kaj oran, surhavantan la literojn F. I. G. La membroj devos ankaŭ promesi ke ili faros ĉion poveblan por helpi la bonvolon kaj la amikajn sentojn kontraŭ la alilandanoj.

*

Belgujo. — En Bruselo fondiĝis pacifista rondeto, nomata « Avanti » (antaŭen), pro la Italoj loĝantaj en Belgujo. Ĝia prezidanto estas S-ro Abelo Caldefferri. Por ĉiuj sciigoj, oni sin turnu al la « delegito-tradukisto » S-ro Luis Carlos, 99, Chaussée d'Anvers, Molenbeek S^t-Jean, Bruselo.

En ĝia lasta kunsido, tiu rondo decidis « sendi sian koran saluton » al nia Societo.

*

Francujo. — La Kongreso de la potenca *Ligo de la Rajtoj de Homo*, kiu sidis en Parizo, la 10-an kaj 11-an de junio, okupis sin pri kelkaj demandoj pacifismaj; la komisiitaro kiu studis ilin estis prezidata de nia komitatano S-ro Casevitz. La Kongreso akceptis jenajn decidaĵojn:

1-e. Gratuloj al Prezidanto Roosevelt pro lia intermeto por la Paco inter Japanujo kaj Rusujo;

2-e. « La Kongreso, konsiderante ke estas konforme al la principoj de la Deklaracio pri la rajtoj de Homo ke, en la konfliktoj inter nacioj, oni anstataŭu perforton per la reguloj de arbitracio, eldiras la deziron ke la franca diplomataro, sin inspirante de la unuanima sento de la demokratio, sekvu politikon decide pacan, kaj penu por efektiviĝi inter la regnoj pligrandigon interkonsentitan, laŭgradan kaj samtempan de la armadoj »;

3-e. Ke, laŭ artikolo 19-a de l'Interkonsentaĵo de 1899, la dua Konferenco en Hago fondu, inter la regnoj kontraktantaj, arbitracian traktaton devigan kaj konstantan, regantan sen diferenco ĉiujn kaŭzojn de malkonsento;

4-e. Ke la dua Konferenco en Hago iniciatu la studon de parlamento internacia oficiala kaj konstanta, ekzemple per la Konferenco Interparlamenta;

5-e. Ke l'Interkonsentaĵo starigota de la proksima Konferenco estu malfermata al la aliĝo de ĉiuj regnoj;

6-e. Ke la *Ligo partoprenu al la movado pacifisma per ĉiuj rimedoj, kiujn ĝi disponas, broŝuroj, elmontroj, paroladoj, kaj precipe penante por enkondukigi en la ĉiugrada instruado metodojn pacifismajn; kaj ke la Ligo partoprenu, kiel eble, en iuj elmontroj pacifistaj.*

Deziro pri la anstataŭo de la armeoj konstantaj per armeoj miliciaj estis transsendata al la komisiitaro de aferoj militistaj kaj al la centra komitato.

*

Germanujo. — S-ro A. H. Fried publikigis, sub la titolo « Dokumentoj de la Pacifismo n-ro 1 », en germana lingvo, la paroladon de S-ro d'Estournelles de Constant, pri la franca-

angla konsentaĵo kaj la plimalgrandigo de la ŝipaj armadoj. 20,000 ekzempleroj de tiu eldonaĵo estis disdonitaj en Germanujo, inter la politikistoj, regnistoj, militistoj, ĉambroj komercaj, scienculoj, verkistoj kaj pacifistoj.

La estraro de la *Reichstag* (deputataro) de Germanujo permesis la disdonon de tiu verketo al la membroj de la *Reichstag* kaj de la *Bundesrat* kaj en Aŭstrujo, oni donis permeson ĝin disdoni al la membroj de la Ĉambro de la Deputatoj.

*

Italujo. — Nova Societo internacia por la Paco fondiĝis en la malgranda Respubliko de Sankta Marino. La festo de fondiĝo fariĝos la 3-an de septembro.

— La itala grupo de l'Unuiĝo interparlamenta por la Paco havis sian kunvenon en Romo. S-ro Biancheri, eksprezidanto de la Cambro, estis nomita honora prezidanto ; S-ro markiso Pandolfi, reala prezidanto, kaj S-ro di Giuliano, subprezidanto.

*

Portugalujo. — La portugala Ligo por la Paco tre bone progresas. Ĝi projektas, por la venonta jaro, kongreson kiu sin okupus pri la koloniaj militoj, tre interesa demando ne ankoraŭ sufiĉe studata de la pacifistoj.

*

Unuigitaj ŝtatoj de Ameriko. — La 11-a ĉiujara konferenco de *Lake Mohonk* fariĝis kun 400 delegitaroj. Tri principaj problemoj estis diskutataj : 1-e. Propagando farota inter la studentoj por ke ili sin interesu pri la problemo de arbitracio ; 2-e. Fondado de societo de internacia juro kaj publikigo de gazeto kiu estus ĝia organo ; 3-e. Ĝenerala arbitracia traktato kiu anstataŭus la nunajn traktatojn. La raporto prezentita de la Komitato de la komercistoj, pruvis ke pacifismo ne estas dogmaro de revemuloj, kiel oni volonte opinias, kaj ke la 39,000 cirkuletoj dissenditaj donis fruktojn. 31 komercaj organizaĵoj, inter ili komercaj ĉambroj, sendis delegitojn al la konferenco de Mohouk, kaj, en la speciala kunsido kiun ili havis, ili esprimis la deziron ke agema kaj neĉesanta propagando estu farata por arbitracio.

V. INTERNACIISMO

Internacia konferenco por la protektado de laboristoj. — Tiu konferenco, kiu sidis en Berno, en majo lasta, alprenis du gravajn decidaĵojn, kiujn ĝi prezentas al la reprezentitaj registaroj. Jen ilia teksto :

I. Pri la malpermeso de l'uzado de blanka fosforo ĉe la fabrikado de alumetoj.

Art. 1-a. — De la 1-a de januaro 1911, estos malpermesite fabriki, enporti aŭ vendi alumetojn enhavantajn blankan fosforon.

Art. 2-a. — La rajtigajoj devos esti interŝanĝitaj ne post la 31-a de decembro 1907.

Art. 3-a. — La japana registaro estos petata aliĝi al tiu ĉi interkonsentaĵo antaŭ la 31-a de decembro 1907.

Art. 4-a. — La plenumo de l'interkonsentaĵo restos submetata je l'akcepto de ĉiuj regnoj riprezentitaj en la Konferenco, kaj je tiu de Japanujo.

II. Fundamentoj de internacia interkonsentaĵo pri la malpermeso de la nokta laboro al la virinoj okupataj en industrio.

Art. 1-a. — La nokta industria laboro estos malpermesata al la ĉiuagaĵaj virinoj, krom la esceptoj ĉi malsupre.

La interkonsentaĵo koncernos ĉiujn industriejojn kie estas okupataj pli ol dek geverkistoj ; ĝi koncernos, en nenia okazo, le entreprenojn kie estas okupataj nur la membroj de la familio.

Ĉiu partoprenanta regno difinos la sencon de la vortoj « industriaj entreprenoj ». Tiuj ĉi enhavos la minejojn kaj ŝtonfosejojn, kaj ankaŭ la industriejojn por fabriki kaj aliformigi materialojn.

La nacia leĝaro precizigos, pri tiu lasta punkto, la limon inter industrio unflanke, kaj terkulturo kaj komerco aliflanke.

Art. 2-a. — La nokta ripozado, aludita en la antaŭa artikolo, daŭros minimume dek unu horojn intersekvajn. Tiuj dek unu horoj, kia ajn estus la leĝo de ĉia regno, devos enhavi la tempon de la deka vespere ĝis la kvina matene. Tamen, en la regnoj kie la nokta laboro de la plenkreskaj virinoj ne estas nuntempe reguligita, la daŭro de la seninterrompa nokta ripozo povos esti limigata al dek horoj, provizore, kaj dum periodo de ne pli ol tri jaroj.

Art. 3-a. — La malpermeso de la nokta laboro povos esti forigata : 1-e, en okazo de necesego, kiam, en ia entrepreno, okazas laborinterrompo ne antaŭvidebla, kaj ne havanta periodan karakterizon ; 2-e, en la okazo, kiam la laboro koncernas materialojn kiuj povas difektiĝi tre rapide, ĉiam, kiam estos necese por savi tiujn materialojn de certa perdo.

Art. 4-a. — En la industrioj submetataj je l'influo de la sezonoj, kaj en okazo de esceptaj cirkonstancoj por ĉiuj entreprenoj, la daŭro de la seninterrompa nokta ripozo povos esti, sesdekfoje en la jaro, plimalgrandigata al dek horoj.

Art. 5-a. — La rajtigajoj de la okazonta interkonsentaĵo devos esti interŝanĝataj ne post la 31-a de decembro 1907.

Pri la plenumo de l'interkonsentaĵo, oni kondiĉos templimon da tri jaroj, datumontaj de l'interŝanĝo de la rajtigajoj. Tiu templimo estos da dek jaroj : 1-e, por la fabrikejoj de ne-

rafinita betsukero ; 2-e, por la kombado kaj ŝpinado de lano ; 3-e, por la nesubteraj laboroj de la minejoj, kiam tiuj laboroj estas malebligataj, almenaŭ dum kvar monatoj ĉiujare, pro klimataj kaŭzoj.



Internacia institucio terkultura. — Internacia konferenco oficiala fariĝis en Romo, pri la fondo de Internacia Instituto terkultura, proponita de la reĝo de Italujo ; 38 registaroj estis reprezentataj.

La Konferenco akceptis protokolon, kiu estos prezentata al la regnoj kiel teksto de interkonsentaĵo subskribota de ili.

Laŭ tiu protokolo, l'Instituto, kiu sidos en Romo, ekfunkciados tuj post dua Konferenco, kiu starigos, en 1906, la detalojn de ĝia funkciado. Ĝi estos direktata de konstanta komitato, kiun elektos la regnoj partoprenantoj. Tiuj ĉi kotizos por plenigi ĝian budĝeton, al kiu la reĝo de Italujo donacis bienon, kiu donas renton da 300,000 frankoj.

Celo de l'Instituto estas :

Kolekti, studi kaj publikigi, kiom eble pli baldaŭe, la sciigojn statistikajn, teknikajn aŭ ekonomiajn pri la terkulturo, la produktado besta kaj kreskaĵa, la komerco de produktaĵoj terkulturaj, kaj iliaj prezoj en la diversaj urboj ;

Liveri al la interesatoj, kun sama rapideco, la suprediritajn sciigojn ;

Sciigi pri la salajroj de la terlaboristoj ;

Konigi la novajn malsanojn kreskaĵajn kiuj aperos en ia loko de l'mondo, la tuŝitajn teritoriojn, la iradon de la malsano, kaj, se eble, la kuracilojn efikajn por ĝin kontraŭbatali ;

Studi la demandojn pri la terkulturaj kunhelpadoj, asekuradoj kaj kreditoj, sub ĉiuj iliaj formoj ; kolekti kaj publikigi la sciigojn povantajn utili, en ĉiuj landoj, al l'organizo de institucioj pri terkulturaj kunhelpado, asekurado kaj kredito ;

Prezenti, laŭbezzone, al l'aprobo de la registaroj, proponojn pri la protekto de la interesoj komunaj al la terkulturistoj kaj por la plibonigo de ilia stato, post ke oni kolektis ĉiujn necesajn sciigojn, ekzemple la dezirojn eldiritajn de la internaciaj aŭ aliaj kongresoj pri terkulturo aŭ sciencoj aplikataj al la sciigojn povantajn utili, en ĉiuj landoj, al l'organizo de institucioj pri terkulturaj kunhelpado, asekurado kaj kredito ;

Ĉiuj demandoj pri la ekonomiaj interesoj, la leĝaro kaj la administro de unu speciala regno, estos ekster la kompetenteco de l'Instituto.

Notinde estas ke la delegitaroj aŭstra kaj germana proponis organizi nur instituton privatan, al kiu partoprenus la

societoj, kiuj volos ĝin. L'organizo akceptita, tiu de instituto oficiala, interregna, estis proponata de la franca delegitaro, kiu sukcesis konvinki siajn kolegojn ; la franca ministro mem de terkulturo, S-ro Ruau, partoprenis en la unuaj kunsidoj.

Tiel internaciismo venkis unufoje pli. Unufoje pli, oni komprenis, oficiale, ke la interesoj de la civilizitaj nacioj estas komunaj, kaj devas esti studataj kaj administrataj komune : tio, en la kampo kiu, ĝis nun, estis la malplej internacia, la plej ĵaluze formata, tiu de la terkulturistoj !

VI. MOVADO ESPERANTISTA

Unua Kongreso Esperantista en Boulogne-sur-Mer. — Pri tiu Kongreso ni ne povas raporti detale tie ĉi : tio estas la tasko de la gazetoj speciale dediĉitaj al la propagando esperantista, kaj ĉiu inter niaj legantoj ricevas, aŭ legos okaze, unu aŭ alian inter tiuj ĵurnaloj.

Ni donos nur nian ĝeneralan impreson, kiu estas duobla.

Unue la sukceso de la Kongreso estis grandega, transpaŝante eĉ la plej ambiciajn esperojn de niaj plej fervoraj amikoj. De nun, la venko estas atingita : Esperanto sin trudis al la atento de la civilizita homaro, kaj ni, kunbatalantoj de la unua aŭ de la dek-unua horo, ĝuis grandan, fortigantan ĝojon, vidante kiel nia majstro Zamenhof eniris en la gloron de senmortemeco, ĉiam simpla kaj modesta, kvazaŭ li ne estus la genia elpensinto de tiu admirindaĵo. Ni sentis ĉiuj ke ni vivas historian momenton, gravegan por la homa civilizado.

La dua impresado estas, ke tiu Kongreso estis festo de la Paco inter la homoj. Ĝi estis kongreso por la Paco, tiel ĝuste, kiel kongreso por Esperanto. La tri enkondukaj paroladoj, de S-ro Peron, urbestro de Boulogne, S-ro Farjon, prezidanto de la Komerca Cambro, kaj Zamenhof, estis himnoj al la Paco ; kaj la vorto « himno » konvenas precipe por tiu lasta parolado, kies fino estas unu el la plej belaj versaĵoj de nia poetema majstro. Same, la toasty dum la festeno, la fina parolado de l'prezidanto Boirac, la paroladoj de la urbestroj de Folkestone, Dover kaj Calais, estis deklarioj pacifismaj, montrantaj antaŭ ĉio la grandan servon, kiun Zamenhof faris al la pacigo de la homaro.

La ĉeestantaj membroj de « *Pacifisto* » ĝojis vidante tiun ĝeneralan emon, kaj ricevis de ĝi novajn fortojn por sia propagando ¹.



Esperanto ĉe la Societoj por la Paco. — La jenaj Societoj jam sciigis la Bernan Oficejon ke ili korespondas en Esperanto :

1. Internacia Instituto por la Paco (Monako).
2. Societo por la Paco de Felletin kaj Aubusson (Francujo).
3. Societo « Gratry » por la Paco (Kanoniko Pichot, en Monako).
4. Ligo internacia por la Paco kaj Libereco, Centra Komitato (S-ro Emile Arnaud, en Luzarches (Seine-et-Oise, Francujo), aŭ S-ro Bovet, (2, Place du Théâtre, Berno, Svisujo).
5. (Sama Ligo), Pariza Komitato (adresi : 7, rue de Bruxelles, Parizo, aŭ al S-ro Gaston Moch).
6. (Sama Ligo), Sekcio de Seine-et-Oise (ĉe S-ro Arnaud).
7. Societo de la ĵurnalo « Les Etats-Unis d'Europe » (ĉe S-ro Bovet).
8. Societo por la Paco kaj internacia arbitracio (40, Outer Temple, Strand, Londono).
9. Societo « Pacon per Justeco », sekcio en La Rochelle, Francujo (ĉe S-ro Meyer).



Esperanto kaj pacifismo ĉe la Delegitaro por la akcepto de helpa lingvo internacia. — Jen la etato de la membroj de tiu Delegitaro, kiuj estas agantaj pacifistoj. Ni montras, per ĉefliteroj, la nacion de ĉia membro (Belgo, Britano, Dano, Franco, Germano, Italo, Ruso, Svedo, Svisoj) ; per la litero B, la membrojn de la Berna Oficejo por la Paco ; per la litero I, la membrojn de la Interparlamentara Komitato ; per unu steleto (*), la aprobantojn de Esperanto ; per du steletoj la esperantistojn ; per tri steletoj, la membrojn de *Pacifisto* ; per demanda signo, tiujn, kies opinio ne estas konata de ni.

Delegito de la *Berna Oficejo* : Gaston Moch (Fr. B). ***

— *Internacia Instituto por la Paco* : Kanoniko Pichot (Fr.) *** ; — Richard (Fr.) ***.

— *Universala Kongreso por la Paco* : Houzeau de Lehaie (Belg., I) *** ; — Moscheles (Brit., B) *** ; — Bayer (Dan.) partiano de la « lingu neutral » ; — Adolf Schmidt (Germ.) *** ; A. H. Fried (Aŭstr.) *** ; — Pesce (It.) * ; — Novicow (Rus., B) * ; — Voirol (Sved., B) (?).

(1) Pri la kunveno de tiuj membroj kiu okazis la 7-an de aŭgusto, vidu pli supre, paĝon 72.

- *Franca Kongreso por la Paco* : Beaurain (Fr) *** ; — Bokanowski (Fr.) *** ; — Fr-ino Bonneval (Fr.) *.
- *Internacia Ligo por la Paco kaj Libereco* : Emile Arnaud (Fr.,B) *** ; — de Montluc (Fr.), *partiano de lingvo latina*.
- *Unuigo internacia* : Le Foyer (Fr.) *.
- *Internacia Societo de Journalistoj pacemaj* : Beauquier (Fr.) (?).
- *Germana Societo por la Paco* : Ad. Richter (Germ., B) * ; — Ad. Schmidt (Germ.) ***.
- *Societo por la Paco de Abbeville kaj Ponthieu* : Tripier (Fr.) **.
- *Societo « Pacon per Justeco »* : Ruysen (Fr.) ** ; — Gabriel Chavet (Fr.) ***.
- *Grupo de « Pacon per Justeco » en Rouen* : Spalikowski (Fr.) ***.
- *Internacia Kongreso de filozofio* : Stein (Sviso, B) (?).
- *Franca Ligo de Instruado* : Le Foyer (Fr.) *.
- *Komerca Cambro de Keighley* (Anglujo) : Rhodes (Brit.) ***.
- *Komerca Cambro de La Rochelle* : Meyer (Fr.) ***.
- *Franca Societo por la progresigo de Sciencoj* : Laisant (Fr.) ***.
- *Internacia Instituto de Bibliografio* (Bruselo) : La Fontaine *.
- *Etnologia kaj antropologia Societo de « Dauphiné »* (franca provinco) : Boirac (Fr.) ***.
- *Franca « Touring-Club »* : Bourlet (Fr.) *** — Sebert (Fr.) ***.
- *Komerca Unuigo de La Rochelle* : Meyer (Fr.) ***.
- *Sveda framasona logio de la « Bonaj Templanoj »* : Wawrinsky (Sved.,B) ***.
- *Akademia Societo de « Loire inférieure »* (Nantes) : Saquet (Fr.) ***.
- *Arta kaj literatura Societo de la francaj fervojaj ofistoj* : Devoucoux (Fr.) ***.
- *Societo de la biciklistoj de Boulogne-sur-Mer* : Michaux (Fr.) ***.
- *Societo de naturaj sciencoj de Neuchâtel* (Svisujo) : Ströele (Svis.) ***.

Resume 35 delegitoj (inter ĉirkaŭ 200) estas konataj kiel agantaj pacifistoj. El ili, 26 (enhavante du Belgojn kaj unu Svison), parolas france ; 4 (enhavante unu Svison), germane ; du, angle ; du svede ; kaj po unu, dane, itale kaj ruse.

28 staras por Esperanto, el kiuj 20 jam aliĝis al nia Societo ; 2 partoprenas kontraŭ Esperanto (1 por *Idiom neutral*, 1 por *Latino*) ; fine, restas 5, kies opinion ni ne konas precize, kredante tamen ke kelkaj estas esperantistoj.

LIBROJ KAJ REVUOJ

Etudes sur la politique extérieure de Etats (Studoj pri la ekstera politiko de la regnoj). — Paris, « Pages Libres », 1905. — Ses volumoj, po fr. 1,50.

Ni rekomendas varmege al niaj legantoj tiun kolekton, ĵus eldonitan de la tre interesa revuo *Pages Libres* (Paĝoj liberaj).

Ĝi konsistas el ses volumetoj, izole aĉeteblaj, kaj esplorantaj la ĉefajn nunajn demandojn de la politiko internacia. Ĉiu inter studoj estas verkita de unu specialisto, kaj tamen la ses verkoj donas la impreson, kvazaŭ ili estus de unu sama aŭtoro. Iliaj spirito, efektive, kaj metodo, estas tute identaj. La spirito estas tiu de justeco internacia, kiel nacia, de respektado de la rajto de ĉiu ; la metodo, tiu de objektiva konsidero de la pozitivaj faktoj, kiuj koncernas ĉian problemon. Tiuj, inter niaj legantoj, kiuj konas la francan lingvon, trovos do en tiu libraro konfidindajn mallongajn gvidilojn.

Jen ĝia mallonga resumo.

1-e. ELIE HALÉVY, *Angleterre et son empire* (Anglujo kaj ĝia imperio). — Unua parto : « ambaŭ politikoj (1868—1885) » ; alterno de la politiko sindetena de la liberaloj, kun Gladstone, kaj de la politiko glorema de la konservativuloj, kun Disraeli (lordo Beaconsfield). De 1869 ĝis 1874, ministraĵo Gladstone, neŭtreco, deteno. De 1874 ĝis 1879, Disraeli incitas la britana-rusan konkuron en Azio. En 1879, Gladstone refariĝas ministro, kaj liberigas Afganistanon kaj Transvalon. En 1882, la ribelado en Egiptujo kaŭzas anglan intermeton ; Gladstone, fariĝinta imperiisto malgraŭ si, falas en 1885.

Dua parto : « la politiko imperiista 1885—1900 ». De nun, la imperiismo venkas tiel, ke, eĉ en ambaŭ ministraroj liberalaj de tiu periodo (en 1886 kaj 1892), la aferoj eksteraj estis konfidataj al ministroj imperiistaj. Interese estas ke la kampo de tiu politiko estis, tiam, Afriko pli ol Azio, kiel antaŭe.

2. HENRI HAUSER, *L'impérialisme américain*. (La amerikana imperiismo).

Dum la britana imperiismo estas precipe afero politika, celado de gloro por la regno kaj de populareco por siaj instigantoj, la amerikana estas precipe ekonomia. Ĝi naskiĝis, ne el la cerbo de politikistoj, sed el la admirinda kreskado ekono-

mia de la Unuigo, kaj el la speciala patriotismo inspirita, al la elementoj tiel malsimilaj, el kiuj konsistas la nacio amerikana, de ilia dankeco al la tero, kiu faras ilin riĉaj kaj liberaj.

La kaŭzojn de l'amerikana imperialismo ; teron, loĝantaron, progreson ekonomian, studas do Henri Hauser, por komprenigi nin pri la nova politiko de Unuigitaj Ŝtatoj, pri ilia eniro en la « regnaron eŭropan ».

3. GEORGES GAULIS, *Les questions d'Orient* (La demandoj orientaj).

Ne ekzistas unu « orienta demando », sed multo da tiaj demandoj : demando turka, demando armenia, demando kreta, grandaj movadoj politikaj kaj religiaj (tutmahometanismo, tutslavismo, tutgrekismo), politikaj ambicioj (Rusujo, Aŭstro-Hungarujo), moralaj influadoj (Francujo, Granda Britanujo), kreskado komerca kaj grandaj fluoj ekonomiaj (Germanujo). Tiujn interbatantajn elementojn analizas Gaulis, por konkludi ke « la demandoj orientaj ne atendas unuopan solvon, taŭgan por ĉio, sed multajn solvojn, diversajn, kaj ofte tre diferencajn inter si. » Sed tiujn solvojn li ne serĉas : li esploras nur, por ĉia demando, la interbatalantajn elementojn, la koncernatajn interesojn, kaj fine la vojon, kien kondukas la faktoj.

4. ALBERT MÉTIN, *L'extrême-Orient : Chine, Japon, Russie* (Ekstrem-Oriento : Ĥinujo, Japanujo, Rusujo).

Sufiĉe estas montri la enhavon de tiu libro, por komprenigi ĝian intereson :

Unua parto : La flava popolo. — La ĥina civilizacio. — Unua kontakto de Ĥinujo kun Eŭropo. — Feŭdala Japanujo. — Moderna Japanujo. — La ĥina-japana milito.

Dua parto : Partigo aŭ malfermita pordo.

Rusujo en Ekstrem-Oriento. — Zonoj de influo kaj projektoj de partigo. — Japanujo kontraŭ Rusujo.

5. FRANCIS DELAISI, *La force allemande*. (La fortiko germana).

Jen estas nacio kiu, antaŭ unu triono da centjaro, malriĉe vivis sur sia nefruktodona tero, sen ia kalkulinda industrio aŭ komerco ekstera ; kaj nun, ĝi estas la dua komercanta nacio, kaj minacas jam danĝere, en ĉiuj vendejoj, la superecon britanan.

La kaŭzojn kaj intersekvajn paŝojn de tiu neatendita evolucio montras al ni, kun plej granda klareco, la aŭtoro. Ili estas, unue, dum dek jaroj, rapida industria suprenirado, kiun favoris la starigo de limimposta protekto, kaj kaŭzis precipe la metoda kunlaborado de la scienculo kun l'industriisto, kaj la partoprenado de la grandaj bankoj, instigitaj de la regno ; dume, metoda preparado komerca, per la plibonigo de la teraj kaj ri-

veraj vojoj, la kreo de personaro kapabla por la granda eksporta komerco, la pligrandigo de la havenoj, la kreo de komerca ŝiparo, ĉi tio dank' al la senĉesa helpo de la regno ; fine, post dek-jara protektado, eniro en la politikon de komercaj traktaĵoj, komenco de la « monda politiko », venko de la germanaj produktaĵoj, en Eŭropo kaj trans la maroj.

En la lasta ĉapitro, Delaisi montras « la postan flankon de l'imperiismo ». La potenca terkultura partio, pro interesoj kontraŭaj al tiuj de industrio, malebligis la konstruon de utilaj kanaloj, postulas la revenon al la protektado ; la socialistoj protestas kontraŭ la monda politiko, pro la militistaj elspezoj kiujn ĝi kaŭzas, kaj pro la konfliktoj, kiujn ĝi povas okazigi ; fine, grandaj ĵaluzoj estas naskitaj de la progresoj de Germanujo, precipe en Granda Britanujo kaj Unuigitaj Ŝtatoj.

6. CHARLES GUIEYSSE, *La France et la Paix armée ; la Conférence de La Haye* (Francujo kaj la paco kun armado ; la Haga Konferenco).

Tiu volumo estas la sola, en la kolekto, kiu prezentas ne nur faktojn, sed ankaŭ la personajn ideojn de l'aŭtoro ; tiel interesa, kiel la antaŭaj, ĝi estas do, principe, diskutebila ; kaj fakte, ĝi estas tre malkonsentinda.

Konstatante ke la Francoj, kiuj estis antaŭtempe tiel militemaj, estas nun, ĉiuj, pacemaj — mi ne diras pacifistoj, sed nur pacemaj — la aŭtoro intencis esplori la kaŭzojn de tiu granda ŝanĝo. Laŭ li, ĝi ne devenas de ia progreso de la ideoj ; « la pacifismo ne estas konsekvenco de principo, kiun la Francoj elpensis, fariĝante pli inteligentaj ».

La pacifismo havas du realajn kaŭzojn.

Unue, la Francoj ne povas plu militi kontraŭ Eŭropo tuta, kiel ili faris iam, kaj estis devigataj forlasi ilian revon — detruiri monarkaĵojn kaj krei naciojn. Ne povante militi, ili juĝis tro grande la pezon de armado : oni ĉiam inklinas juĝi bona la staton en kiu oni estas devigate.

Due, Francujo produktas malmulte, terkulture kaj industrie. Ĝiaj produktantoj, protektitaj de limimpostoj, fariĝis mallaboremaj. Ili deziras komercan pacon, kiu ebligus ilin riĉiĝi sen granda laboro, kaj estas pacifistoj pro tio ke pacifismo estas la malo de imperiismo, de konkuro ekonomia.

Nenia pacifisto povos konsenti kun tiuj teorioj.

Certe, la progreso de l'pacifismo en Francujo ne devenas el tio, ke la Francoj subite fariĝis pli inteligentaj, aŭ pli bonaj : tia evolucio postulus centjarojn. Sed ili fariĝis pli lertaj, pli instruitaj per iliaj veraj interesoj, kaj por tio, kelke da jaroj sufiĉas. Cetere, argumenti ke oni inklinas juĝi bona ĉiun devigatan staton, estas ĝenerale malprave, kaj estas precipe mal-

koni la karakteron de la Francoj, kiuj, instinkte, ribelas kontraŭ ia trudata ideo aŭ stato.

Pli malkontentiga ankoraŭ estas la ekonomia parto de tiu analizo. Unuflanke, estus interese esplori, kial la protektado estus naskinta supreniradon en Germanujo kaj Unuigitaj Ŝtatoj, kaj haltadon en Francujo : ĉu, ekzemple la ŝuldo, la militaj sangeltiroj, la nacia karaktero, la speco de la produktaĵoj, k. c., ne influis ? Sed ankaŭ, la aŭtoro, videble, konas malmulte la pacifistojn, kiuj estas esence anoj de libera interŝanĝado, t. e. de senĉesa konkuro ekonomia. Cetere, li montris sian malklarecon, kiam li resumis mem sian libron en la revuo *Pages Libres*, klarigante ke li dediĉis unu trionon de tiu verko al la Haga Konferenco, tial ke, « laŭ mia kono, nenia pacifisto eldonis ion pri tiu fama Konferenco. Oni povas demandi al si, kial ? Mi penis por plenigi tiun mankon, kaj determini la ĝustan taŭgecon de l'Interkonsentaĵo, pri kiu la pacifistoj permesas cirkuladon de tiom da ideoj malpravaj, kiam ili tiel facile povis konigi la simplan veron. »

Kora amiko de l'aŭtoro, kaj sincera admiranto de lia agado, permesos al si, tie ĉi, diri al li ke, laŭ franca proverbo, li trapuŝis malfermitan pordon. Se li, anstataŭ verki solece, estis demandinta ian pacifiston, oni estus sciiginta lin pri tuta pacifisma libraro kaj artikolaro, traktanta kaj kritikanta la Konferencon kaj ĝiajn rezultatojn !

Cetere, oni devas aldoni, ke tio, kion li skribis pri ĝi, estas tute bona kaj prava, kun escepto de du sengravaj eraroj faktaj. Erare estas (p. 54) ke la malgrandaj regnoj amerikaj ne komisiis delegitojn, pro manko de intereso : ili ne estis invitataj, kiel ne havantaj ambasadorojn en St.-Peterburgo ; kaj, ĉar la Haga Interkonsentaĵo estis fermita¹, ili anstataŭis ĝin, kiel ili povis, en 1902, per la Interkonsentaĵoj en Meksiko kaj Korinto. Kaj due (p. 56), eble estas ke, kiam S-ro Descamps insistis por ke l'Interkonsentaĵo estu malfermata, li pensis al la Papo. Sed li, sendube, ne pensis « nur al la Papo ». Li estas, efektive, unu inter la plej bonaj juristoj de l'pacifistaro ; kaj nia teorio estas ke paca interkonsentaĵo devas, esence, esti malfermata por ĉiuj bonvolaj regnoj.

ALEXANDRE ULAR, La germana « Weltpolitik » (*monda politiko*) kaj la Mahometanaro (artikolo en *Lingvo Internacia* n-roj de la 1-a de julio kaj la sekvintaj).

Sub tiu titolo, S-ro A. Ular skribis, en la pariza *Revue* (1-an de junio), artikolon pri kiu ni tre atentigas niajn legantojn, ĉar ĝi rimarkinde plenigas la suprecititan libron de Delaisi,

(1) Vidu Vortaron pacifisman.

kaj reciproke. L'aŭtoro estas cetere unu inter la homoj, kiuj konas plej bone, dank' al longaj vojaĝoj kaj al multaj gravaj personaj rilatoj, ne nur la mahometanan, sed ankaŭ la ekstrem-orientan mondon

Ni intencis doni en nia revuo analizon kun ekstraktoj de tiu artikolo. Sed, ĉar *Lingvo Internacia* enhavas resumon de ĝi, kiu estas preskaŭ plena traduko, ni povas nur konsili ke oni legu atente tiun studon, kies partoj estas : Generalaĵoj ; — La Protektanto de la Mahometanoj ; — La pordo de Mezararo ; — La Kalifo de Bagdado ; — La transmezopotamia fervojo ; — La turka-germana tutmahometanismo.

VORTARO PACIFISMA (II)

(La vortoj enhavantaj en tiu vortaro estas nur provizore proponataj de ni, ĉar revuo estas devigata esprimi sian penson laŭ bezone, kaj ne povas atendi, por ĝin fari, ke la necesaj vortoj estos oficiale aprobitaj.)

Kompreneble, kiam nia majstro Zamenhof kaj lia Lingva Komitato estos difinintaj vortojn por tiuj ideoj, ni konformigos nian lingvaĵon kun la atendata decidaĵo.)

Eksterregneco, la eco de personoj kiuj, kiel la fremdaj regnestroj, diplomatoj aŭ konsuloj, kaj la fremduloj en kapitulaciaj regnoj, ne estas submetitaj sub la leĝoj de l'regno kie ili loĝas.

Kapitulacio, traktato subskribita kun iaj landoj (kiel Turkujo, Egiptujo, Ĥinujo, k. c.), por doni al la fremduloj, loĝantaj en la koncernita lando, iajn privilegiojn, kaj interalie, por ke ili ne dependu de la enlandanaj juĝistaroj. La regnoj, al kiuj tiaj traktatoj estis trudataj, estas kapitulaciaj regnoj.

Fermita traktato, traktato al kiu ne subskribintaj regnoj ne povas aliĝi.

Libera maro, la maro, trans la limo de la regnaj akvoj.

Malfermita traktato, traktato enhavanta kondiĉon, kiu specifikas ke la regnoj ne subskribintaj povas aliĝi al ĝi propra-move.

Regnaj akvoj aŭ **regna maro**, la parto de la maro kiu estas konsiderata kiel propraĵo de la borda regno kaj submetata sub ĝiaj leĝoj kaj regularoj (ĝis 3 maraj mejloj, t. e. 5 1/2 kilometroj de la bordo).

Ŝovinismo, la inklino, kiu karakterizas la ŝovinistojn.

Ŝovinisto, homo kies patriotismo, supermezura kaj ekskluziva, konsistas precipe el malŝato, malfido kaj malamo kontraŭ la fremduloj kaj la fremdaj nacioj.

(Tiu vorto ekzistas en sufiĉe da lingvoj por ke oni povu konsideri ĝin kiel internacian. Ĝi esti jam uzata en Esperanto.)

Gaston Moch.

KORESPONDADO

Al S-roj L. en *Parizo*, kaj B. en *Praha*.

Ni tre bedaŭras ke la anoncaĵoj rilatantaj al vi, en n-ro 1-a de *E. P.*, ne estis tute ĝustaj : ni elprenis ilin el aliaj gazetoj.

Sed, se vi deziras ke ni enpresu, en niajn sekvontajn numerojn, ĝustajn anoncojn, vi devos sendi al ni, ne nur vian precizan tekston, sed ankaŭ *la respondan monon*, laŭ la tarifo de la 3-a paĝo de l'kovrilo.

Ni faris, en nia prova numero, multekostan donacon, presante tiujn multajn anoncojn po 4000 ekzempleroj, kies pli ol duono estis dissendataj senpage. Sed vi ne povas ja supozi ke la Societo daŭrigos tiun oferon, kiun ĝi faris nur pro la espero ricevi pagitajn anoncojn !

Se ni estus komerca societo, celanta profiton por siaj membroj kaj direktoroj, ni ne kuraĝus paroli tiel ofte pri mono. Sed ni estas societo neprofitema, kies direktantoj oferas monon, tempon kaj laboron : la aliaj donu almenaŭ monon, kaj penu por havigi monon, varbante aliĝojn kaj anoncojn ! Ni bezonas multe da mono : ĝis nun, ni elspezis aŭ ŝuldas trifoje pli, ol ni ricevis — kaj ni ne komencis eldoni la *Libraron pacifisman* !...

Tio ne povas daŭri.

La Komitato.

*

AL KELKAJ MEMBROJ, kiuj miris ke ili ricevis kelkajn ekzemplerojn de la 1-a numero.

Ni dissendis rapide ĉirkaŭ 2000 ekzemplerojn de nia 1-a numero, uzante kelkajn nomarojn, kiujn kontroli ne povis la personoj, kiuj skribis la adresojn. Kompreneble estas do ke kelkaj duoblaj aŭ trioblaj sendoj okazis.

Sed oni ne devas konsideri tiujn ekzemplerojn kiel malŝparitaj ; kaj, precipe, oni ne devas ilin resendi al ni, kiel faris kelkaj societanoj. Oni, kontraŭe, ilin disdonu por la propagando, por varbi novajn aliĝojn.

Car ni presigis 4000 ekzemplerojn de tiu numero, ni povos ankoraŭ sendi senpage, por la sama celo, kelkajn centojn. Oni skribu do al ni, per simpla poŝta karto, la adresojn de personoj, kiujn oni supozas aligeblaj, kaj kiuj ne jam ricevis la revuon ; ni tuj sendas al ili provan numeron.

La Komitato.

LIBRARO PACIFISMA

Ĵus aperis la 1-a verko de tiu kolekto :

HISTORIO RESUMA

DE

L'ARBITRACIO KONSTANTA

DE

GASTON MOCH

Prezidanto de l'Instituto Internacia por la Paco
(en Monako), Komitatano de l'Internacia
Oficejo de la Paco (en Berno).

Prezo, afrankite, **30** centimoj.
Are, ĉiu ekzemplero po **15** centimoj,
transsenda kosto plie.

Oni mendu ekzemplerojn ĉe
S-ro **Gabriel Chavet**, 14, rue du Château,
Neuilly-sur-Seine (Francujo).

(La membroj de la Societo Esperantista
por la Paco ricevas unu ekzempleron
senpage, kiel aldonon al N-ro 1 de *Espero
Pacifista*.)

MEMORAĴO

DE LA

1-a KONGRESO DE ESPERANTO

Post la grandega kaj fruktoplana sukceso de la Unua Universala Kongreso de Esperanto, multaj esperantistoj demandis ĉu estus eble aĉeti aron da kolektotaj memoraĵoj pri tiu grava historia okazo. Por kontentigi tiun deziron, estas sendataj al ĉiuj kiuj pagos *du frankojn* :

1-e, *Kongresa Libro*, de Paul Boulet. Tiu libro, 164-paĝa, bele eldonita, enhavas multajn ilustraĵojn (inter kiuj belan portreton de D-ro Zamenhof kaj artan fotografaĵon de la profesoroj-komitatoj de la grupo de Boulogne), poeziojn de D-ro Zamenhof, interesan gvidlibron enhavantan ĉiujn utilajn sciigojn pri Boulogne, gravan deklaron kiun D-ro Zamenhof legis dum la Kongreso kaj kiun ĉiu Esperantisto devas koni, plenan frazlibron francan-esperantan por turistoj, kiu enhavas ĉiujn frazojn necesajn dum vojaĝo kaj estas ulege lernilo kiu tre helpas la praktikan lernadon de nia lingvo ;

2-e, *Broŝuro* enhavanta la projektojn diskutotajn de la Komisio elektita dum la Kongreso ;

3-e, *Adresaro* de la gekongresintoj ;

4-e, *Detala programo* de la kongresaj festoj ;

5-e, Specimeno de la *Karto de Kongresano* ;

6-e, Specimeno de la *Kongresa Poŝtkarto*, de S-ro Rollet de l'Ile ;

7-e, *Diversaj cirkuleroj* pri la organizacio de la Kongreso.

Ni konsilas al ĉiuj kiuj deziras ricevi tiun interesan aron da kongresaj memoraĵoj ke ili sendu *kiel eble plej baldaŭ* sian mendon al : S-ro PAUL BOULET, sekretario de la 1-a Kongreso de Esperanto, 49, strato Louis Duflos, *Boulogne-sur-Mer* (Franclando).

Anoncoj (kalkulataj laŭ linioj kompostitaj per presliteroj « petit » aŭ « korpo 8-a » — laŭ modelo de tiuj ĉi 3 linioj — po 52 literoj aŭ signoj en ĉiu linio) :

1 paĝo = 41 linioj	25 frankoj
1/2 » = 20 »	15 »
1/4 » = 9 »	8 »
1/8 » = 4 »	5 »
1 linio	1 fr. 50.

Rabato, por 3 presoj :	10 0/0
» » 6 »	20 0/0
» » 12 »	40 0/0

La **membroj de la Societo Esperantista por la Paco** pagos nur la duonon de la ĉi supraj prezoj.

Plie, por la **membroj de la Societo**, ni presas malgrandajn anoncojn **nekomercajn**, po 1 franko ĝis 4 linioj (1 ĝis 4 linioj, 1 fr. ; 5 ĝis 8 linioj, 2 fr. . . .). — Ses presoj, 5 fr. anstataŭ 6.

ONI POVAS MENDI ĈIUJN LIBROJN
 ABONI ĈIUJN GAZETOJN
 ESPERANTAJN

ĉe la

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

(*Akcia Societo de diverslandaj Esperantistoj*)

33, rue Lacépède, PARIS

kaj aparte :

Kurioza Sunhorloĝo, de S. POLJANSKIJ, kun 4 figuroj kaj 2 kalkul-tabeloj (*2-a eldono*) : **20 centimoj**.

Esperanta Frazlibro de l'Turisto, 400 utilaj frazoj en Esperanto kun tradukoj angla, franca, germana, hispana, itala (el la Jarlibro de la Franca Turing-Klubo), kaj adresaro de diverslandaj grupoj esperantistaj (*2-a eldono*) : **50 centimoj**.

Esperanta Sintakso, laŭ verkoj de *D-ro Zamenhof* kaj aliaj, en Esperanto, de PAUL FRUICIER : **1 fr. 50 c.**

Esperanta Versfarado, de TH. CART kaj PARISOT : **50 c.**

Trafendita Turo, de TH. CART, *vendata por la blinduloj* : **25 c.**

Perdita kaj retrovita, orig. rakonto de E. BOIRAC : **60 c.**

Edziĝo Kontraŭvola, unuakta komedio de MOLIÈRE, — esperantigita de V. DUFUTREL ; ludota en la Kongreso en Boulogne-sur-Mer : **60 centimoj**.

Paŭlo kaj Virginio, de *Bernardin de Saint-Pierre*, tradukita de H. HODLER : **1 fr. (en presado)**

Granda VORTAREGO FRANCO-ESPERANTA

la unua tiaspeca verko en Esperanto, internacie redaktata sub la kontrolo de « **Lingvo Internacia** » kaj « **L'Espérantiste** », 2000 paĝoj : **17 frankoj. Prospekton senpage.**

La presejo entreprenas ĉiaspecajn presajn laborojn

Esperantistoj !

Aliĝu al « Pacifisto »

Konigu « Espero Pacifista »

Varbu novajn aliĝojn

Anoncu en « Espero Pacifista »

Sendu tuj viajn kotizaĵojn !